IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 52 - trimonata
2022/4

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Adjévi Adjé
Marija Belošević
Laura Brazzabeni
Jean-Pierre Cavelan
Norma Cescotti Covelli
Renato Corsetti
Mireille Grosjean
Isikawa Tieko
Marija Jerković
Anna Löwenstein
Alessandra Madella
Stano Marček
Radojica Petrovič
Josip Pleadin
Ahmad Reza Mamduhii
Hassano Ntahonsigaye
Spomenka Štimec
Nitta Takamichi
Kristin Tytgat
E. Vilisics Formaggio



“La Silka Vojo” el la jutuba kanalo de ILEI **(vd. p. 13)**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Sukcesa „Tago de Lernado" (Marija BELOŠEVIĆ) 4
Kristin TYTGAT: *Dulingvaj lernejoj en Bruselo* 6
Nitta TAKAMICHI: *Kiel lernantoj gajnas memfidon* […] 9
Alessandra MADELLA: *Pri la jutuba kanalo de ILEI* 13
Intervjuo kun Jean-Pierre Cavelan (Alessandra MADELLA) 18
Ĉu Aĥilo aŭ la grekoj konkeris Trojon? (Renato CORSETTI) 20
Kunspirado (Mireille GROSJEAN) 24
Intervjuoj de A. M. al S. Štimec, A. Löwenstein, E. Vilisics Formaggio 27
El la landoj kaj sekcioj (IN, BI, IT, HR, MG) 36
Tibor Sekelj refoje inter esperantistoj (intervjuo de Radojica PETROVIĆ al Renato CORSETTI kaj Ahmad MAMDUHI) 42
Alvoko de la 56-a ILEI-Kongreso 51
Esperanto per rekta metodo (Stano MARČEK) 52
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj 53

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Ĵanejro cep 21220-310, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram,WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Membroj*:**

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Grafikaĵo de Alessandra Madella el la „Silka Vojo" en la jutuba kanalo de ILEI (vd. p. 13)

Sur la dorskovrilo: „Esperanto per rekta metodo" lernolibro de Stano Marček (vd. p. 52)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Unue mi antaŭgratulas vin pro la proksimiĝanta novjaro 2023, kaj tiuokaze elkore deziras ĉian bonon por vi kaj viaj familioj. Samtempe mi memorigas al vi pri pagado de viaj kotizoj ĝis la 31-a de decembro por ricevi IPR 2023/1 ĝustatempe. Se ial ajn vi sukcesus pagi la kotizon nur post tiam, bv. samtempe informi pri tio ankaŭ nian karan kasistinon por ankoraŭ ricevi la unuan numeron de la revuo en 2023 nemalfrue.

Ĉiam komenciĝo de nova jaro enpensigas kaj esperigas nin pri pli bonaj vivkondiĉoj kaj mondo. En la nuna tempo feliĉe ni plejofte bone scias kio plibonigas la mondon kaj kio male, plimalbonigas ĝin. Tamen, ne ĉiuj ni, kaj ne ĉiam, agas laŭ niaj lernitaj scioj, kvankam ni nun kredas, ke la plej bona kaj plej efika edukado estas tiu, kiu kondukas nin al ŝanĝiĝo kaj ŝanĝo. Se ni nur lernas ion pasive kaj ne utiligas tion aktive por plibonigi nin kaj nian medion, estas kvazaŭ kiel se ni fakte ne lernis tion.

Tiaj lernado kaj edukado inkluzivas ĉiujn terenojn, ekz-e ĉu sociajn kaj politikajn, ĉu ekonomiajn kaj medicinajn.

Ni kaj nia Ligo tre bonŝancas havi rolon en instruado kaj edukado – precipe kun internacia perspektivo danke al nia esperantisteco kaj la inkluzivemo, kiun tio donacas al ni.

Ankaŭ en tiu ĉi numero de nia multjara organo ne mankas pluraj materialoj tiurilate, ĉu en tradiciaj kaj fizikaj kadroj, ĉu kadre de modernaj kaj virtualaj formoj. Bonvolu ĝui la legadon!

Ahmad Reza MAMDUHI

Sukcesa „Tago de Lernado”

Jam tradicie, marda duontago estas rezervita al la „Tago de Lernado” en prizorgo de ILEI. Post du virtualaj „Tagoj de Lernado”, ĉi-jare denove ni havis la eblecon ĝui vivan kvin-horan programon kun temoj proksimaj al edukado kaj instruado.

La ĉefa temo de la „Tago de Lernado” estis „Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj” kaj subtemo „Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado”.



Bedaŭrinde, la pandemio kaj ĝiaj postsekvoj grave influis la preparon de la evento. Kelkaj prelegantoj forfalis pro la fakto, ke ili ne povis vojaĝi. Surloke inter ok prelegantoj surpodiiĝis nur ses: unu preleganto entute ne alvenis pro manko de vizo kaj alia unu tagon antaŭe infektiĝis: Zdravka Metz (Kanado), Duncan Charters (Usono, *vd. la foton*), Katalin Kováts (Nederlando/

Hungario), Orlando Raola (Usono) kaj Kristin Tytgat (Belgio). La prelego de Maritza Gutiérrez (Kubo) estis prezentita en skriba formo[1].

Tradicie, oni enkondukas la programon per prezento de la eduka sistemo de la gastiganta lando. Tamen, pro amplekseco, oni donis atenton al Kebekio. Sekvis interesaj prelegoj, kiuj de diversaj flankoj proksimigis la ĉeftemon.

Laŭ la impresoj de la partoprenantoj, la programo estis kvalita kaj interesa, kion montris la nombro de la kongresanoj en la salono. Espereble, oni povos legi la tekstojn de la prelegoj en IPR.

La kompletan programon dum kelkaj monatoj pretigis Marija Belošević (Kroatio). Surloke gvidis ĝin Duncan Charters kaj Orlando Raola.

Marija BELOŠEVIĆ



aŭskultantoj de la prelegoj (foto de Katalin Kováts)

[1] NdlR – Versio de ŝia prelego aperis en IPR 2015/4, p.4-9. Vi povas elŝuti ĝin ĉe: https://www.ilei.info/pdf/Ipr154_elibre_huicfehfvuih.pdf

Dulingvaj lernejoj en Bruselo
Ĉu solvo por la plurlingveco de la lernantoj?[2]

de Kristin TYTGAT (Belgio)



I.

Bruselo, la ĉefurbo de Belgio, havas ministron de multlingveco. Lia tasko estas grava, ĉar en la urbo de 1,2 milionoj da loĝantoj kaj de 180 nacioj estas parolataj pli ol 100 lingvoj.

Por pli bone funkciigi la komunikadon en la kosmopolita urbo, por plifortigi la sociajn ligojn inter ĝiaj enloĝantoj kaj por faciligi la laboreblecojn, multlingveco fariĝis prioritato por la brusela ministro kun la nomo Sven Gatz.

Lia celo estas, ke ĉiuj bruselanoj fariĝu trilingvaj. Ili devas paroli la francan kaj nederlandan, la du oficialajn lingvojn de la urbo, kaj plie la anglan, mondan lingvon de ekonomiko kaj kulturo. Krom tio li ankaŭ konsideras la fakton, ke la hejmaj lingvoj de la bruselanoj tre gravas por efika komunikado en la urbo.

Ĉu trilingveco de ĉiuj enloĝantoj estas realisma celo? Ni povos reveni al tiu demando pli poste.

Por atingi la celon de plurlingveco, pluraj politikaj partioj en Bruselo volas krei dulingvajn lernejojn en la urbo. Nun infano lernas en nederlandlingva aŭ franclingva lernejo kaj ne estas vere dulingva je la finstudo. Krome, sciencistoj pruvas, ke plurlingveco stimulas la aktivecon de la cerbo. Sendube por trovi laboron post la studoj, plurlingveco estas granda avantaĝo.

[2] Prelego dum la Tago de la Lernado, la 9-a de aŭgusto 2022, okaze de la 107-a Universala Kongreso en Montrealo

Pro tiuj kialoj politikistoj petis sciencistojn en bruselaj universitatoj krei projekton de dulingvaj lernejoj.

Estas fakto, ke la nuna instruado en Bruselo ne plu respondas al la multlingva realo de la urbo. Pro tio la franclingva Libera Universitato de Bruselo kaj ĝia nederlandlingva partnero komencis plurajn esplorprojektojn rilate la temon.

Problemo por starigi dulingvajn lernejojn kuŝas en la jura strukturo de Belgio: la nederlandlingva instruado en Bruselo dependas de la flandra komunumo, same kiel en Flandrio, la norda regiono de Belgio. La franclingva instruado dependas de la franclingva komunumo, same kiel en Valonio, la suda regiono de Belgio.

La regiono Bruselo neniel havas la rajton interveni en tiujn kompetentecojn. Sekve la infano, aŭ ties gepatroj, devas elekti aŭ nederlandlingvan lernejon aŭ franclingvan. Krei dulingvajn lernejojn, kie ambaŭ instrulingvoj estas egalrajtaj, donas konstituciajn problemojn. Certe ekzistas pluraj solvoj por eliri el tiu ĉi malfacila situacio, unu solvo pli drasta ol la alia. Sed sendube la projekto bezonas tempon kaj juran eltrovemon por esti realigata.

II.

Intertempe CLIL-instruado ekde la infanĝardeno povas jam esti tre efika. CLIL (Content and Language Integrated Learning aŭ Enhava kaj Lingva Integrita Lernado) estas instruado de ne-lingva fako en fremda lingvo. En la franca EMILE signifas „Enseignement d'une Matière par Intégration d'une Langue Etrangère". Tiu tipo de instruado estas ŝajne tre sukcesa en Kanado, dulingva lando. Jam en la sesdekaj jaroj de la 20-a jarcento lernejo en Montrealo eksperimentis kun tia instruado. Grupo de anglalingvaj gepatroj volis, ke la lingvaj baroj inter la angla kaj franca lingvoj malaperu, sed ili vidis, ke la influo de la franca lingvo en la provinco de Kebeko kreskas. La gepatroj volis, ke iliaj infanoj estu dulingvaj por trovi bonan laboron en la regiono. La paraleloj inter Montrealo kaj Bruselo estas okulfrapaj: en Bruselo, ĉefe franclingva urbo, la nederlandlingvaj lernejoj havas pli prestiĝan reputacion. Infanoj kun alia gepatra lingvo ol la nederlanda venas lerni tie. Kvankam la urbo estas ĉefe franclingva, kiel jam dirite, la laborlokoj postulas ofte dulingvecon. Sekve la lernado en nederlandlingva lernejo tre gravas por la estonteco de la infanoj. Tre ofte ili poste venas studi en nederlandlingva universitato en Bruselo. Eĉ la venonta reĝino de Belgio

sekvas tiun sekuran itineron por certe esti estontece dulingva por siaj civitanoj, se tiam Belgio ankoraŭ ekzistos.

‘Eniĝo’, ‘mergiĝo’, ‘enakviĝo’ (immersion france kaj angle) aŭ CLIL estus bona aliro por tiaj postuloj. La infanoj lernas EN alia lingvo anstataŭ alian lingvon. La dua lingvo (L2) ne estas aparta fako sed instruilo por lerni matematikon, geografion ktp.

Por tia instrumetodo oni bezonas du instruistojn, kiuj ĉiam uzas la saman lingvon kun la infanoj. La instruisto, kiu uzas L2, ne povas traduki al L1, la gepatra lingvo. Bona kunlaboro inter la du instruistoj de L1 kaj L2 estas bezonata. La pedagogia celo estas dulingveco, la demokratia celo estas, ke ĉiuj infanoj povu partopreni en tiuj lecionoj.

La evoluo de la intelekto de la infanoj estas pozitiva, ĉar la intelekto ricevas multajn stimulojn pro la daŭra ŝaltado de unu lingva sistemo al la alia. Infanoj devas serĉi ekvivalenton por konceptoj kaj havas sekve pli flekseblan cerbon. Ilia memorkapablo estas pli granda ol tiu de unulingvaj infanoj. Se oni komencas tre frue la CLIL- instruadon, la kognaj avantaĝoj estas tre grandaj.

Multlingva instruado pozitive efikas sur nian cerbon: ni pli rapide, pli facile lernas. Ju pli da stimulado de la neŭronoj en la cerbo, des pli da neŭronaj ligoj estas kreataj laŭ la neŭropsikologoj. La rezulto estas, ke la cerbo pli bone funkcias. Tio ne nur estas la kazo kun infanoj, sed okazas dum lingvolernado ĉe ĉiuj aĝuloj.

Plurlingvaj infanoj lernas pli facile aliajn fremdajn lingvojn, ĉar ili estas lingve pli konsciaj. Tion pruvas pluraj studoj. Tiuj studoj konstatas, ke plurlingvaj homoj daŭre devas reformuli kognajn konceptojn, esprimojn kaj lingvajn strukturojn de unu lingvo al la alia. Tio faras ilin lingve tre fleksiĝemaj kaj rapidaj. Unulingvaj infanoj tradukas de unu lingvo al la alia laŭvorte, kiam ili lernas fremdan lingvon. Pro tio ili estas pli rigidaj kaj pli malrapidaj en la formulado de konceptoj, esprimoj kaj strukturoj.

III.

Kiuj estas la praktikaj konsideroj?

1) Krom la kono de la nederlanda kaj franca lingvoj, la ministro Gatz ankaŭ revas pri kono de la angla lingvo ĉe la lernantoj. Konsiderante ke ili jam ofte havas ankoraŭ alian hejman lingvon kiel ekzemple la araban aŭ la turkan, oni devas supozi, ke tiuj infanoj devas fariĝi

kvarlingvaj. Tio jam estas tre granda defio, kiu eble por multaj ne estas atingebla kaj kiun eĉ la Eŭropa Unio ne postulas.

2) Kiel aspektos tiuj lernejoj en la praktiko? Ĉu la lernantoj povos elekti, kiuj estas L1 kaj L2 kondiĉe ke oni plivastigos la CLIL-instruadon? La kostoj por funkciigi la lernejojn estos sendube altaj, ĉar oni devas antaŭvidi ĉiujn strukturojn duoble por la infano, kiu estos de komenco aŭ nederlandlingva aŭ franclingva, sed kiu devos ricevi egalrajtajn eblojn.

La evoluo de la projekto certe estos sekvinda, ĉar ne estas dubo, ke dulingvaj lernejoj estas utilaj kaj necesaj en Bruselo.

Kiel lernantoj gajnas memfidon kaj kial tio gravas por la tuta komunumo

Nitta TAKAMICHI



Ĉu Esperanto estas facila por azianoj? Tiu retorika demando estas vaste kundividita inter Esperanto-parolantoj en Orientazio. Por kompreni la situacion, vi povas turni vin al la listo de kontribuintoj en ĉiu broŝuro de internaciaj revuoj. Alie, sufiĉus unu-du klakoj en la retejo de *Monato* por scii, kiom da azianoj okupas Monaton. Supozeble, vi ne tro mirus, se vi okupiĝas pri Esperanto-movado longtempe. „Forta movado" ne signifas membrokvanton de ĉiu organizaĵo, sed membrokvanto malkreskas ĉiam pli lastatempe. Do, anstataŭ maltrankviliĝi pri malmultiĝo de membroj, estas realisme okupiĝi pri plibonigo de kvalito de spertoj de ĉiu lernanto, ĉar tion ni povas fari.

Por ŝanĝi la situacion, antaŭ jaroj mi lanĉis internacian konkurson KIK2 (Konkurso Internacie Kontribui) kun relative granda monpremio. La sistemo estis simpla. Ĉiu partoprenanto gajnas poenton kontraŭ sia kontribuaĵo. Kaj homoj kundividas tutan sumon de la premio laŭ poentoj. Nome, valoro de unu poento pli grandiĝas en malpli evoluintaj landoj. Homoj, kiuj rimarkis tion, tuj aliĝis al la konkurso. Sed ial, aliĝintoj ne kontribuis al revuoj. La situacio ne facile ŝanĝiĝis. Mi, kiel organizanto de la konkurso, rekte


demandis kelkajn, kiuj estis sufiĉe kapablaj por ekverki en la lingvo. La respondo estis simpla. Ili diris ke „Mi ne havas memfidon.”

Mi ne scias, ĉu estas firma strukturo en la lingvo aŭ en la komunumo por malhelpi aktivan partoprenon de azianoj. Tamen rigardante edukadon en japana Esperantujo, mi sentas, ke tie mankas ia strukturo por havigi memfidon al ĉiu lernanto. Tial en mia privata kurso PRILUMI, mi penas kuraĝigi kaj motivi homojn. Fruktojn de senĉesa kuraĝigo kaj konstanta motivado vi povas vidi en niaj atingoj: ni sukcese varbas niajn lernantojn por KER-ekzamenoj kaj okazigas sesiojn plurloke; lernantoj ĉe mi verkas kaj kontribuas al internaciaj revuoj; unu el tiuj gajnis la 3-an premion de la Premio Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento ĉi-jare.
Gravas ne nur „kuraĝigi”, sed ankaŭ „nemalkuraĝigi”. En la artikolo por Premio Mauro La Torre mi klarigas kial, montrante ĉefajn studojn de la kampo kaj kiel praktiki mian instrumetodon, dezajnita surbaze de homa transkona sistemo kaj aktiva lernado.

En la metodo oni uzas kartojn, tamen tiuj ne ĉiam estas kvar-angulaj. La formo mem gvidas lernantojn por instinkte rimarki gramatikajn regulojn de Esperanto. Homoj ne eraras facile, ĉar la kartoj limigas homan eraron. (Pri tio mi parolos poste.) Alia karakterizaĵo de la metodo estas tio, ke ĉiu sesio okazas en senĉesa interparolo inter instruisto kaj lernanto. Dum la sesio instruisto kuraĝigas kaj laŭdas, se tio ne maleblas. Kaj fine de la sesio lernanto jam estas kapabla finverki rakonteton per du frazoj. Tiam lernanto rimarkas, ke per lernitaj gramatikaĵoj kaj vortoj oni jam povas esprimi ion en la lingvo. Tiel naskiĝas Esperanto-lernanto kun memfido.

La metodo baziĝas sur ĝisnunaj atingoj en la metodika kampo, de klasikaj artikoloj aŭ libroj de Lev Vygotsky (1896-1934), Caleb Gattegno (1911–1988), B.F. Skinner (1904-1990), Albert Bandura (1925-2021) kaj aliaj ĝis artikoloj aŭ eksperimentoj en moderna epoko. Nome, la metodo estas dezajnita por realigi idealan lernadon ĉe lernantoj: interparolo, demandoj kaj konsiloj subtenas lernostrategion ĉe lernantoj; ĉiu ŝtupo estas malgranda por ne malkuraĝigi lernantojn kaj por doni al ili memfidon; (mal)facileco estas modera por ĉiu lernanto, por ke homoj lingvemaj kaj mallingvemaj ambaŭ povu ĝui lernadon; lernanto povas uzi sian instinkton por rimarki ion; ofta interago gvidas lernantojn al problemsolvo; ankaŭ pri fleksebleco de vortordo kaj akuzativo, kiuj ne malofte konfuzas homojn, oni povas lerni en 20-30 minutoj.

Jen la kartoj uzataj en sesio.




Unue oni lernas kiel elparoli kaj kie kaj kia estas la akcento de la lingvo, uzante kartojn de O-vortoj. En la praktiko, lernanto pli kaj pli kapabliĝas kaj kreskigas en si memfidon. Sekvas A-vortoj, verbo, kaj -as, -is, -os. Por fari verbon de infinitivo al as-modo oni ne devas senkuraĝiĝi. Eble vi iam vidis, ke homoj senkuraĝiĝas en la tasko fari „scias" el „scii" kaj „as" aŭ „konas" el koni kaj as. En japanlingva medio, tio estas unu el tipaj malfacilaĵoj por malkuraĝigi komencantojn. Mi ŝatus demandi: „Ĉu tiaj malkuraĝigaj aferoj estas necesaj por kapabliĝo?" En la metodo, danke al kartoj bone formitaj, oni ne devas sperti tion.

Kartoj estas tre utilaj por lerni vortordon de Esperanto, ĉar oni ne devas skribi ĉiufoje kaj povas facile movi „vortojn" tien kaj reen. En ĉiu vortordo oni povas konstati strukturon de frazo. (*vd. foton de karto sekvapaĝe*)

La sistemo, kiu instigas metakognadon ĉe lernantoj, instigas mem rimarki danke al kartoj kaj ofta interago kun instruisto rezultigas jenajn rakontetojn el du frazoj post 20-30-minuta sesio.

Jen la rakontetoj post ĉiu sesio.

Kato ploras, ĉar muso manĝis kukon.
Aŭto kuras rapide, kaj hundo ĝojas.
Birdo flugas, ĉar bebo atendas.
Kato dormas, sed muso laboras.




11-jara lernejano faris jenan frazon.

Saĝa muso bele kuris, sed saĝa kato muson manĝos.

Por kompari, ni vidu atingojn de Esperanta „Silent Way" en la libro de Oene Hoekstra (1923-1999) „La esplor-kreiva vojo, apliko de humanisma lingvo-instrua modelo".
Tie Hoekstra montras du skribaĵojn, kiujn verkis lernantoj post 20-hora lernado.
Estas tre bonaj atingoj post 5 tagoj da lernado, tamen rimarkeblas tie iom da eraroj pri literumo kaj pri gramatiko. Kvankam en sesio, kiun mi proponas en la artikolo, ne eblas finverki tiom longan skribaĵon (ĉar la sesio daŭras nur

20-30 minutojn), tamen en la metodo oni ne povas erari ĉe literumo kaj gramatiko.


16.

ha kurso

La kurso estas tre lerniga kaj interesa. Estas sep lernantinoj kaj unu lernanto. Hans Jeantien kaj Trude ne estas plu tie ĉi.

Gerard visitis nin hieraŭ kaj rakontis multajn aferojn.

Sinjoro Piet ankaŭ visitas al ni kaj diris ke ni parolos en mil naŭcent okdek kvara esperanton bone

La kurso estas preskaŭ finita. Morgaŭ estas la lasta tago.

Esperanto ne estas tre facila lingvo por azianoj, kiuj neniam ellernis t.n. eŭropajn lingvojn. Tial malgrandaj ŝtupoj, kuraĝigo, interago, kaj kontentiga rezulto, ĉiuj ĉi tiuj estas gravaj.

En la fino de la prelego okaze de VEKI-3, oni demandis min, ĉu Esperanto estas facila por azianoj. Mi respondis, ke tio ĉi estas „puzlo”, kiun ni povas ĝui, en la senco, ke tro facila puzlo devas esti teda. En tiu senco ni estas tre feliĉaj solvi ĝin.

Mi faris pli ol 100 sesiojn post la unua sesio de la 17-a de majo 2014. Tamen mi ne certas, ĉu mia artikolo estus utila por eŭroplingvanoj. Povus esti „superflua”. Ĝis nun ne nur unu fojon mi deziris, ke homoj en Eŭropo, Sud- kaj Nord-Amerikoj imagu la situacion de edukado en Azio. Sed por lingvemaj eŭroplingvanoj, kiujn mi povis renkonti ĝis nun, ne estas facile imagi tion. Tial enmanigo de la Premio Mauro La Torre forte kuraĝigas min, kiu aktivas for de la loko kie Mauro La Torre lasis brilajn atingojn kaj provojn por tiamaj kaj nunaj samlingvanoj. Kun dankoj al la familio La Torre kaj ILEI, mi esperas, ke la Premio plu instigos kaj kuraĝigos instruistojn kaj esploristojn de la lingvo Esperanto.

Pri la jutuba kanalo de ILEI

de Alessandra MADELLA (Italio)

Certe ĉiuj ILEI-membroj jam scias, ke la Ligo havas sian propran jutuban kanalon, „Esperanto + Edukado ILEI”[3]. Ĝi estis kreita la 11-an de aŭgusto 2017 fare de Mirejo, kiu estas ĝia posedanto. Ĝis la 30-a de oktobro 2022, la dato kiam tiu ĉi artikolo estis finverkita, ĝi jam akiris 36 946 vidojn kaj 599 aliĝintojn. La nomo de la kanalo devenas de ideo de la franca samideano Didier Janot, laŭ kiu gravas klare montri al la ekstera publiko, ke ILEI estas

[3] Vidu ĉe https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/featured.

Esperanta asocio, kiu ĉefe zorgas pri edukado. Dum la jaroj, iĝis administrantoj de la kanalo homoj el diversaj mondopartoj, laŭ indiko de la estraro. Ankaŭ tio eble iel influis la ŝanĝojn en la landa distribuo de la publiko. En 2019 la spektantoj estis plejmulte el Brazilo, sed ekde 2021 ili iĝis plejmulte el Hispanio kaj Italio. La geografia distribuo de la tuta publiko de la komenco ĝis nun, kalkulita laŭ vidoj, estas la sekva: Hispanio (16,4%), Italio (12,5%), Brazilo (2,4%), Francio (1,3%), Japanio (0,7%), Sud Koreio (0,6%), Usono (0,3%), Kanado, Rusio, Hungario (0,2%), Slovakio, Svislando, Pollando, Ukrainio kaj Germanio (0,1%). Sekvas Romanio, Argentinio, Meksikio, Malajzio, Kostariko, Belgio, Britio, Norvegio, Kolombio kaj aliaj. La kanalo de ILEI sendube atingas plurajn kontinentojn, kiel devus esti kanalo de vere internacia asocio, kvankam ĝia centro estas ankoraŭ Eŭropo. Ni devus, do, daŭre labori cele al ĉiam pli granda internaciigo de la enhavoj kaj de la publiko. Kompreneble, ni devas ankaŭ konsideri, ke en kelkaj landoj ne ĉiam facile eblas spekti Jutubon. En tiuj kazoj ofte indas cirkuligi almenaŭ kelkajn el la plej allogaj videoj ankaŭ per lokaj sociaj retejoj. Ekzemple, la svis-hispana ILEI-membro Maximiliano Garcia faris tion en la pasintaj monatoj pere de sia kanalo en la apo WeChat en Ĉinio. Li alŝutis tien la unuajn tri partojn de la „Granda Homa Ĉeno” (simbola projekto de ILEI por vide montri la valoron de Esperanto kaj edukado, kiuj pace kunligas la homojn de la mondo) kaj artajn videojn kiel la filmeto „La Silka Vojo” de MA-GA filmoj pri la ujgura nacio de la ĉina provinco Xinjiang. La miloj da homoj, kiuj spektis tiujn videojn en Ĉinio, estas pruvo de la interkultura altiro kaj bonvenigo de niaj enhavoj en malsamaj formoj kaj kuntekstoj.

Kiel la nuntempa ĉefa prizorganto de la jutuba kanalo de ILEI ekde novembro 2021, mi havas kelkajn administrajn rajtojn, kiuj interalie ebligas al mi vidi la statistikojn de la kanalo kaj de la unuopaj videoj. Mi decidis prezenti kelkajn el ili en tiu ĉi artikolo, por helpi nin konkrete pripensi kiel eblas pli bone videbligi Esperanton kaj ILEI en socia komunikilo kiel Jutubo, interesi novajn spektantojn kaj revenigi ilin al ni kiel eble plej ofte. Mi precipe komparos la datumojn de 2021 (de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro) kun tiuj de 2022 (de la 1-a de januaro ĝis la 30-a de oktobro 2022), kun la celo helpi per la ekzemplo de tiu detala esplorado aliajn respondeculojn de Esperantaj komunikiloj. Indus certe fari seriozan komparan analizon de tiuj ĉi statistikaj datumoj kun tiuj pri aliaj Esperantaj jutubaj kanaloj, precipe de la plej grandaj internaciaj asocioj. Tiamaniere, ni povus pli bone kompreni la malsamajn partojn de la Esperanta kaj potenciale Esperanto-ema publiko, kiujn ni kune atingas, pli efike pripensi nian

respektivan altir-kapablon por malsamaj publikoj kaj tiel fortigi niajn apartajn ecojn, cele al la komuna atingado de ĉiam pli vasta reto da spektantoj.



Araba karavano el la filmeto „La Silka Vojo" de MA-GA Filmoj. Desegnis Alessandra Madella.

En 2021 la jutuba kanalo de ILEI ricevis entute 8 220 vidojn (23% pli da vidoj kompare kun la antaŭa jaro), kun 551,7 horoj da spektado kaj 96 novaj aliĝintoj (38% malpli kompare kun la antaŭa jaro). En 2022, malgraŭ la du monatoj ankoraŭ mankantaj al la fino de la jaro, la datumoj jam altiĝis al 21 269 vidoj, 664,7 horoj de spektado kaj 218 novaj aliĝintoj. Evidentiĝis, do, granda kresko, kiu dependas verŝajne de la elekto koncentriĝi pri pli mallongaj, sed pli allogaj videoj, male al la kanalo UEAviva de Universala Esperanto-Asocio, kiu privilegias longajn prelegojn kaj kongresojn. Multaj esploroj parolas pri la pli mallongiĝanta atento-kapablo de la publiko de sociaj komunikiloj. Malmulte da videoj, eĉ longaj, kapablas kapti la spektantojn por pli ol 1 minuto kaj duono. Sed homoj pli volonte spektas ankaŭ iom pli longajn videojn de kanaloj, je kiuj ili jam fidas kaj kiujn ili

jam povis rekte sperti kiel interesajn. Ili kompreneble ankaŭ pli volonte prezentas ilin al geamikoj.

Povas esti interese iel kompari la popularecon de la videoj dum la lastaj du jaroj por pli bone kompreni la daŭran laboron kaj la diversajn strategiojn de konstruado de tiu intereso. La plej intensan koncentriĝon da vidoj en 2021 ricevis kune alŝutita grupo pri VEKI-2 dum la somero (la nacia vespero pri Benino, la granda debato pri Afriko, la komitatkunsido ktp). Sekvis en novembro du aliaj kune alŝutitaj videoj: la alparolo de Maximiliano Garcia dum la Monda Konferenco pri Edukado ĉe UNESKO kaj la prelego de Bruĉjo Kasini pri la instrua projekto „30 Oraj Horoj" dum la renkontiĝo por la projekto VERDEN de Erasmus + en Parmo, Italio. La plej spektita unuopa video en 2021 estis la franca prezentado pri la „Kungfua Kunikleto" (2 359 vidoj), sekvata de la voĉlegado fare de Mirejo de intervjuo al Miguel Herberg pri la Kunikleto (678) kaj ŝia prezentado de ILEI por Amo-seminario (335). Sekvis la alparolo de Maximiliano Garcia ĉe UNESKO (273) kaj la prezentado de la nova eldono de la *Manlibro* fare de Katalin Kováts (227).

Kompare kun tio, la plej intensa koncentriĝo da vidoj en 2022 ricevis en aŭgusto la samtempe alŝutitaj videoj de la triagrada ekzameno de Esperanto dum la Itala Kongreso de Brescia, la klarigo de Jo Mo pri la origino de la vorto „kadeto", la dua parto de la „Granda Homa Ĉeno", Gafur Mirzo pri Uzbekio kaj la portretoj de la germana pentristino Helga Plötner. La plej spektitaj unuopaj videoj en 2022 estis denove la franca prezentado pri la „Kungfua Kunikleto" (1 946) kaj la intervjuo al Miguel Herberg (839), la komenco de la „Granda Homa Ĉeno" (730), sekvataj de la juna japana samideanino Chieri Minami rilate al la UNESKO-celoj pri daŭripova evoluigo (715), la artema filmeto „Koloroj" de Maximiliano Garcia (618) kaj la unua leciono de Esperanto en la araba kadre de la Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (599).

Resume, ni povas vidi, ke la granda kresko de nia publiko en 2022 dependas de nia disponebleco akcepti divers-tipajn kontribuojn, de muzikaj al artemaj al engaĝitaj, sen forgesi la ĉefan rolon de edukado. Publik- kaj partopren-orientitaj iniciatoj ne nur por esperantistoj, kiel la „Granda Homa Ĉeno", same helpis nin larĝigi la atingatan publikon. Fakte, pli profunda esplorado montras al ni, ke lastatempe novaj spektantoj revenis al la kanalo precipe por videoj kiel „Kion faras la instruistoj meze de la nokto?" (animacia varbado por la virtuala kongreso de ILEI VEKI-3), „*Volete studiare l'esperanto?*" (animacia varbado por kursoj de Esperanto en Italio), la tri unuaj partoj de la „Granda Homa Ĉeno", „Helga Plotner: pentristino" kaj „Jo Mo: la eta hundo

faris grandan vojaĝon”. La kazo de la unua video estas precipe interesa: multe da homoj klare alvenis al nia kanalo serĉante ne „Esperanton”, sed „Irma Vep”, titolo de televida serio de la franca reĝisoro Olivier Assayas, inspirita de film-serio de Louis Feuillade en 1914. Tamen, ili poste amase revenis por spekti aliajn videojn de nia kolekto. De tiu vidpunkto, ne estas strange, ke la instruado de Esperanto en la araba iĝis vere populara ne je la momento de sia publikado, sed kiam la publiko larĝiĝis en multe da aliaj direktoj kaj la voĉo pri ĝi komenciĝis pli vaste cirkuli. Pruvo de tio estas ankaŭ, ke en la multe pli impona jutuba kanalo UEAviva la sama video pri instruado en la araba ricevis nur 123 vidojn dum 6 monatoj, kio estas trioble malpli. En sociaj komunikiloj la rekta vojo pri varbado ne ĉiam estas la plej efika: tio estas nepre pripensinda afero, kiun oni ne devas forgesi.

Tiu strebado atingi publikon, kiu povas interesiĝi pri Esperanto, el ĉiuj eblaj direktoj kaj fonoj donis siajn pli videblajn fruktojn en la juniĝo kaj genra reekvilibriĝo de nia publiko. En 2021, la statistike signifa publiko estis 100% virinoj pli ol 65-jaraj kaj 99% ne uzis subtitolojn. La ĉefaj regionoj de tiu publiko estis Hispanio (15,7%), Italio (9,6%), Brazilo (2,8%), Francio (1,7%) kaj Sud-Koreio (0,7%). La tuta tempo de spektado de la aliĝintoj al la kanalo, kompare kun la ne-aliĝintoj, estis nur 38,2 %.

Male, en 2022, la ĉefaj regionoj iĝis Hispanio (21,8%), Italio (17,9%), Francio (1,1%), Brazilo (1,0%) kaj Japanio (0.9%). La tempo de spektado de la aliĝintoj al la kanalo, kompare kun la ne-aliĝintoj, iom kreskis al 40,6% kaj 99% de la spektantoj daŭre ne uzis subtitolojn. Vira spektantaro denove aperis kaj eĉ atingis 59,8%. La aĝo de la nova publiko estas miksita: 44,5% estas inter la aĝoj de 55 kaj 64 jaroj, kvankam restas ankoraŭ 55,5% pli ol 65-jaraĝa. Ni povas parenteze rimarki, ke la publiko inter la aĝoj de 55 kaj 64 povus esti konstituata de instruistoj aŭ aliaj laboristoj, kiuj atingis en siaj institucioj pozicion de sekureco kaj respekto, aŭ de junaj emeritoj, kiuj povus havi tempon kaj energion kontribui al nia movado. Temas, do, pri grava grupo por realigi la celojn de ILEI enkonduki Esperanton en lernejojn kaj pli vaste en la vivon de niaj socioj. Samtempe, tiu pli larĝa kaj diversa publiko garantias al ni ankaŭ pli grandan videblecon ĉe internaciaj institucioj, kiuj zorgas pri edukado, kiel ekzemple UNESKO.

Ankaŭ la maniero trovi la videojn iom ŝanĝiĝis. En 2021 oni faris tion ĉefe pere de retejoj kaj apoj, kiuj montris kunligojn de la videoj (34,2%) aŭ pere de serĉado en jutubo (20,1%). Nur 13,6% de la trafiko alvenis rekte de la aliaj paĝoj de la jutuba kanalo de ILEI. Sed en 2022 niaj videoj estas trovataj ĉefe el la paĝoj de nia kanalo (30,3%) kaj iom malpli ofte pere de la indikoj

de aliaj retejoj kaj apoj (28,4%). Tiu evoluo ŝajnas reflekti la fakton, ke jam sufiĉe kreskis la „fido” de nia publiko, kiu daŭre revenas al nia kanalo por trovi novajn informojn, sciante, ke ili povas esti interesaj, allogaj kaj sufiĉe variaj por reprezenti diversajn flankojn de Esperanto kaj edukado. Konklude, ni povas esperi, ke tiu fido daŭre plialtiĝos ankaŭ en la venontaj jaroj, ligite al niaj temoj de edukado al paco, daŭripoveco, interkultura komprenemo kaj internacia kunlaboro pere de Esperanto.

Intervjuo kun Jean-Pierre Cavelan pri *Zamenhof-biografio*

Jean-Pierre Cavelan, arta nomo Yanpetro Kavlan, estas pentristo de Nico, Francio. Dum VEKI-3, li prezentis sian kunlaboran bildstrian projekton *Zamenhof-biografio* https://photos.app.goo.gl/h854JC2eciXWmdAdA. Li nun afable akceptis respondi al pliaj demandoj de *Internacia Pedagogia Revuo* pri sia verko.



AM: *Alessandra Madella*
YK: *Yanpetro Kavlan*

AM: Kiel vi renkontis Esperanton?

YK: Mi renkontis Esperanton en mia hejmo, ĉar mia patro iĝis la unua esperantisto en mia familio en 1964. Poste mia frato sekvis lian ekzemplon en 1970 kaj mi eklernis la lingvon de Zamenhof nur post tri jaroj. Mia edzino kaj mia patrino sekvis nin poste.

AM: Kio estas laŭ vi la rilatoj inter pentrado kaj Esperanto?
YK: Pentri liberigas la imagon, danke al kio la dialogo kun si mem kaj eventuale kun la aliaj iĝas pli facila. Sed pentrado ne permesas ekspliciti la ideojn. „Ĉi tio ne estas lingvo”, povintus skribi la pentristo René Magritte. Por eksplicite kaj reale komuniki, interŝanĝante informojn kaj ideojn, lingvo nepre necesas. Por komuniki kun sia najbaro, loka lingvo ne nur utilas, sed indas esti amata de siaj bonŝancaj parolantoj. Por sin liberigi el ĉia etnocentrismo, Internacia Lingvo restas la sola solvo. Oni certe ŝatas la lokon, kie oni vivas, kiam oni ne sentas sin enfermita en ĝi. Ĉi tiu amo de libereco kondukis min al lernado kaj praktikado de la lingvo Esperanto. Do, por mi

Pentrado kaj Esperanto kompletigas sin reciproke kaj restas intime ligitaj.

AM: Ĉu vi bonvolas paroli al ni pri via longdaŭra projekto „Zamenhof-biografio”?

YK: Mi multe deziras interesi la esperantistaron pri ĉi tiu projekto, kiu naskiĝis antaŭ 27 jaroj kaj de tiam dormas en la malnovaj kartonaj desegnujoj de mia pentrejo. Mi estis preskaŭ forgesinta pri ĝi, kiam antaŭ kelkaj semajnoj mi ĝin retrovis, provante ordigi mian ejon. Fakte, en la jaro 1995 mi renkontis René Centassi (Renato), kiu estas kunaŭtoro de la franca libro *L'homme qui a défié Babel*, poste tradukita al Esperanto kiel *La homo kiu defiis Babelon*. Tiam Renato proponis al mi krei bildstrion de la libro. Mi tuj komencis la projekton, sed mallonge poste Renato mortis kaj mi ne sentis min kapabla daŭrigi la verkon sola. Plue mi havis multe da aliaj laboroj, ĉiam pli urĝaj, kiuj voris mian tempon …Tial la projekto endormiĝis kaj mi preskaŭ forgesis pri ĝi. Sed, kiam mi retrovis ĝin, mi tuj ekkonsciis, ke nun la kondiĉoj estas tute malsamaj. Intertempe Interreto ekis kaj per ĝi kunlaborado iĝis ege pli facila. Tial la projekto vigle revekiĝis kaj jam interesas multajn aliajn samideanojn.

AM: Kial vi elektis la akvarel-teknikon por ĝi?

YK: Akvarelo kaj inko estas la plej rapidaj kaj simplaj teknikoj por obteni bildojn kaj tuj ciferecigi ilin. Oni eĉ povas krei virtualan akvarelon rekte ciferece, sen uzi paperon. Plue, akvarelo permesas obteni bildojn, kiuj bonege adaptiĝas al la legado sur ĉiuj ekranoj. La provaĵoj jam montritaj ŝajne plaĉas al la publiko.

AM: Kiel vi esploradis pri la rakonto?

YK: La unua fonto de historiaj informoj estis la libro de Renato Centassi kaj Henri Masson. Sed estus tre interese reekzameni la tutan historian kuntekston dum la vivo de Zamenhof. Mi invitas la publikon kunlabori por helpi min prezenti kiel eble plej ĝuste la historion de la movado dum kaj post la vivo de Zamenhof. Tio estas ankaŭ granda ŝanco kune lerni per esplorado kaj per komunikado pri gravaj temoj. Korekti la tekston de la bildstria libro aŭ aldoni notojn al ĝi kaj diskuti ĝian enhavon povus trafe kaj utile esti temo de lecionoj por lokaj grupoj ktp. Mi mem zorgos pri la fina korektado kaj stila kohero, sed granda laboroe estas bezonata por atingi perfektecon.

AM: Ĉu vi pensas pri ebla tradukado al aliaj lingvoj krom E-o kaj la franca?

YK: Certe. La internacia publiko ludas grandan rolon, ĉar per tradukoj al

pluraj lingvoj tiu ĉi projekto por la esperantistaro celas interesi ankaŭ ne-esperantistojn de diversaj lingvo-grupoj kaj reklami samtempe favore al Esperanto. Ankaŭ en tiu senco, ĝi povus iĝi bona pedagogia helpilo.

AM: Pri kiuj aliaj artaj projektoj vi uzis Esperanton kaj aliajn lingvojn?

YK: En mia poliptiko titolita SPACTEMP (olea pentraĵo sur tolo, kiu mezuras 9 kvadratajn metrojn) mi uzis Esperanton en la verko kaj en ĝia koncepto. Plue mi kreis originale en Esperanto la bildstriojn *Momo*, *Kuniks la kuniklo* kaj *Gu kaj Pil*. Mi ankaŭ verkis originale en Esperanto mian libron *Taglibro de vojaĝo*.

AM: Dankon, kara Yanpetro. Espereble multe da samideanoj helpos vin en via laboro.

Ĉu Aĥilo aŭ la grekoj konkeris Trojon? Pri ILEI kaj ĝiaj sekcioj.

Ĉiuj junaj eŭropanoj en iu momento de sia eduka kariero renkontas la militon de Trojo aŭ en la lernejo per lernado de la poemo de Homero, Iliado, aŭ en la kinejo, per unu el la multaj filmoj bazitaj sur tiu poemo.

Iusence Homero estis speco de praa 'milita raportisto', kiu, kiel faras modernaj raportistoj, ne nur raportas la eventojn, sed samtempe adaptas ilin al la linio de la propra lando aŭ de la propra gazeto. En la tempo de Homero la ĝenerala penso postulis, ke oni sukcesas venki militojn nur, se viaj dioj helpas vin. [Komparu la Biblion, se vi ne kredas min]. Kaj krome specialaj individuoj, kiuj havas iun apartan rilaton kun unu el la dioj, estas la ĉefaj agantoj.

Pro tio ni scias ĉion pri Aĥilo, la greka heroo, liaj kolero kaj amoj, kaj apenaŭ ion pri la miloj kaj miloj da grekoj, kiuj batalis kaj mortis por konkeri la urbon, kaj ankoraŭ nun ni penas kompreni, kio vere okazis.

Kaj tio, kio vere okazis, estis, ke greka armeo batalis kontraŭ la regnaro de Asuŭa, en kiu estis la urbo Wilusa [=Ilios], kaj konkeris ĝin de la antaŭa imperio hitita. En tiu longa milito la kvar tagoj, dum kiuj Aĥilo koleris, estis neglektinda eventeto kompare kun la cento da bataloj kaj la multaj miloj da mortintoj.

Sed kiel ĉi tiuj mitaj rakontoj rilatas al Esperanto kaj ILEI, kiuj estas aferoj modernaj, eventuale eĉ postmodernaj. La rilato estas en la menso de la esperantistoj, kiuj, kiel la publiko de Homero, volas aŭdi pri la heroaĵoj de la herooj kaj ne pri la jardeka laboro de la greka armeo por konkeri Trojon, en nia okazo por disvastigi Esperanton.

Finfine la heroaĵoj estas io bela, kiel la vorta batalo inter Blinkenberg kaj Lapenna en Montevideo dum la asembleo de Unesko kaj la laboro de la amaso da membroj de ILEI estas io banala.

La ĉefa mesaĝo, kiun mi volas doni, estas tiu ĉi: kiu realigas la celojn de ILEI? Ĉu la prezidanto? Ne, li devas fari belajn inaŭgurajn paroladojn kaj komuniki al la membroj vizion de la estonta ILEI. Ĉu la komitatanoj? Ne, ili devas decidi, kiu ricevu la revuon je duona prezo post la konferenco kaj kvereli inter si pri la lasta amendo al la regularo. Kiu do devas realigi la celojn de ILEI, kies unuan celon mi kopias el la statuto:

Artikolo 4

TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN

4.1 Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.

Laŭ mi la membroj de ILEI, la normalaj, sennomaj membroj tra la landoj, tiuj, kiuj pagas sian kotizon kaj pacience dormas dum la tro longaj fest-paroladoj, estas la ĉefaj agantoj. Ni supozu, ke ni volas disvastigi Esperanton en Mongolujo aŭ en Svedujo kaj instruigi ĝin en la mongolaj kaj svedaj lernejoj. Ĉu la prezidanto povas fari ion pri tio? Li nek parolas la mongolan nek la svedan kaj li loĝas en alia mondoparto. Tre malverŝajne li povas fari ion tian. Ĉu la komitatanoj povas fari tion? Se ILEI havas aktivajn mongolan kaj svedan komitatanojn kaj estraranon pri landaj sekcioj, kiu helpas ilin, certe ili povas fari multon. Sed ankaŭ ili estas unuopuloj, kaj tio, kion unuopulo povas fari en 24 horoj estas io limigita. La plej granda helpo, kiun ili povas doni estas „*4.1 Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la '... propra lando' por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto."*

Do, en la fino ni venas al la veraj laborkapblaj homoj. Temas, por daŭrigi per niaj ekzemploj, pri la instruistoj kaj instruantoj de Esperanto en Mongolujo kaj Svedujo, alivorte la landaj sekcioj de ILEI.

Nun mi defias, iun ajn kiu volas esti defiata, nei, ke la listo de sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj estas io formala kaj neniel funkcianta por atingi la unuan celon de la artikolo 4. Ekzistas kompreneble esceptoj, sed unu mano kaj duono sufiĉas por nombri ilin.

Sekve, ni ĉiuj provu rekonstrui la laboran strukturon de ILEI. Por fari tion, ni, la centraj babilantoj, devas diri al la sekcioj tion, kion ni atendas de ili, kio estas resumita en folio, kiu devus vaste cirkuli inter la membroj de ilei:

~~~

Idealaj taskoj de landa sekcio de ILEI

1. administraj
- kontakti ĉiujn instruistojn kaj instruantojn de Esperanto en la lando kaj proponi al ili membriĝi en ILEI
- kolekti la kotizojn kaj sendi ilin al ILEI
- teni adresaron de ĉiuj membroj de ILEI en la lando
- funkciigi sistemon de interkontaktado inter la landaj membroj de ILEI, kiuj aŭtomate konsistigas la landan sekcion.

2. Esperanto ĉe lernejoj/universitatoj
- informi pri Esperanto instruistojn kaj lernantojn en sia lando
- aranĝi kursojn kaj prelegojn pri Esperanto en lernejoj kaj universitatoj
- aranĝi Esperanto-konkursojn por lernejanoj
- eldoni materialon kiel legolibrojn taŭgajn por lernejanoj

3. Esperanto ĉe Esperanto-kluboj
- aranĝi kursojn en lokaj Esperanto-kluboj
- varbi lernantojn

4. Aliaj taskoj
- disponigi lernomaterialon taŭgan por la lando/lingvo
- interŝanĝi ideojn kaj spertojn kun la aliaj landaj sekcioj
- partopreni la kampanjojn de la ĝenerala ILEI
- aranĝi trejnadon de la landaj instruistoj kaj instruantoj
- varbi profesiajn instruistojn por ke ili organizu en sia lernejo „unu lecionon pri Esperanto”.



Renato CORSETTI, membro de ILEI kaj instruanto de Eo, kiu atendas, ke ILEI petu ion de li
~~~

Ĉi-jaraj enketoj ĉe landaj sekcioj kaj reprezentantoj

Sekve de diskutoj ĉi-jare oni enketos ĉe la landaj sekcioj kaj reprezentantoj ĉefe demandante pri la bazaj laboroj de ILEI, alivorte ĉu la sekcio de tempo al tempo kontaktas ĉiujn instruistojn kaj instruantojn de Esperanto en la lando, informas pri Esperanto instruistojn kaj lernantojn en sia lando, aranĝas kursojn pri Esperanto en la lernejoj de sia lando kaj por la esperantistoj en sia lando, partoprenas la kampanjojn de ILEI.

Alivorte, iom pli banale: kiom da kursoj de Esperanto okazas en la lernejoj de via lando kaj kiom da kursoj por la ĝenerala publiko okazas en viaj landoj, inkluzive de la retaj.

Ĉu vi kunligas la instruantojn de Esperanto en via lando?

Renato CORSETTI
helpanto de la estrarano de ILEI pri landaj sekcioj

Jen modelo de raporto, kiun ILEI atendas de ĉiuj siaj sekcioj.

Raporta modelo por Landaj Sekcioj de ILEI por 2021
Nomo kaj mallongigo en Esperanto: Japana Sekcio de ILEI/ILEI-JP
Nomo kaj mallongigo nacilingve:
国際教育者エスペランティスト連盟日本支部/ILEI日本支部
Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI: 1986 / 2010 (reorganizite)
Jura statuso: ne
Rilato kun Landa Asocio de UEA: En kunlaboraj rilatoj
Membro-nombro fine de 2021:
Sume: 19, Detale: superaj 5, retaj 13, aliaj (HM,DM) 1
Nombro de rajtigitaj komitatanoj por 2021: 2
Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:
Oficiala hejmpaĝo: ne
Oficiala ret-adreso: tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp (kiel sekciestro)
Ĉu via sekcio havas retgrupon: Jes. Ni plusendas gravajn, necesajn mesaĝojn de ILEI al niaj membroj per retgrupo. Laŭbezone, ni sendas kelkajn mesaĝojn eĉ al interesatoj ekster nia retgrupo.
Revuo sekcia: Ekde 2014 ne aperis nia organo „LUCERNO”.
Enlanda membrokotizo: ne
Nuna estraro de la sekcio:
Sekciestro: ISIKAWA Tieko tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp
Tate 2-4-4-304, JP-353-0006, Siki-si, Saitama-ken

Sekretario/Kasisto: ISINO Masayo isino.masayo@nifty.com
Higasi-komagata 3-11-5-301, JP-130-0005, Sumida-ku, Tokyo-to
Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:
Du jaroj, la sekva elekto okazos en 2023

=== ***Agado*** ===
Propraj aranĝoj dum 2021:
Ni komencis la programon „Ni parolu!” en septembro. Ĝi estas japanversio de „Ekparolu!”. Japanoj ĝenerale hezitas paroli kun alilandanoj pro diversaj kialoj, do ni helpas al ili kutimiĝi al Esperanta interparolo kun japanoj unue kaj poste espereble kun alilandanoj. La kurso daŭras 30 minutojn, entute dek sesiojn, senpage. Ene de 2021 aliĝis al la kurso pli ol 20 personoj, kaj gvidis sep membroj de nia sekcio. La programo daŭras en 2022.
Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis: ne
Propraj projektoj dum 2021: ne
Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris: ne
Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:
Varbado okazis diversmaniere; okaze de Japana Esperanto-Kongreso, Esperanto-seminario de Japana Esperanto-Instituto, pere de „La Revuo Orienta”, la organo de JEI ktp.
Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:
Unu el niaj membroj aktivas en JACTFL (Japan Council on the Teaching of Foreign Languages) kaj sukcesis videbligi Esperanton dum iu simpozio.
Konata E-instruado en via teritorio:
En kelkaj universitatoj okazis oficialaj kursoj de Esperanto, kun 2 poentoj. Bedaŭrinde nia sekcio ne havas rektan rilaton kun iliaj gvidantoj.
Aliaj atingoj en 2021: ne

Enketila plenskribinto: ISIKAWA Tieko, sekciestro, 2022.06.07

Kunspirado

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

En Greziljono, okaze de la staĝo „Printempas”, mi gvidis kurson por progresantoj, por homoj, kiuj intencas baldaŭ trapasi la KER-ekzamenon en nivelo C1. La grupo konsistis el ok personoj.

Ni renkontis la radikon spir- kaj esploris pri ĉiuj eblaj kunmetaĵoj per tiu radiko. Aperis senspira, spirhaltiga, enspiri, elspiri…. kaj de estona

partoprenanto (ina), Piret, aperis „kunspiri”. En la estona lingvo tiu kunmetaĵo esprimas la kvaliton de kunlaboro, la harmonian kunvivadon de homgrupo. Tian „kunspiradon” ni fakte spertis, praktikis, ĉar mi lanĉis rolludojn kaj debatojn, kie ĉiuj laŭ sia emo kaj laŭ siaj kapabloj partoprenis kaj kontribuis.

Ni eĉ konstatis praktikan rezulton de tiu „kunspirado”. Ni rimarkis la altan nivelon de franca partoprenanto, Paŭlo, kiu malgraŭ siaj grandaj konoj en gramatikaĵoj, penis meti la akcenton ĉe la vortoj; rezultiĝis ebena parolado glata kun frazfina akcento tute franceca. Ni provis ripetigi lin, deklamigi lin, sed la natura kutimo revenis en kura maniero (laŭ fama citaĵo: „Chassez le naturel, il revient au galop” - Forpelu la naturan manieron, ĝi revenas en galopo). Ni ne povis kantigi lin pro la proksimeco de alia laboranta grupo en apuda ĉambro. Mi esprimis mian vanan kaj sensukcesan pripenson pri iu rimedo, maniero, strategio, por fari, ke li „kantu” nian lingvon metante la akcentojn en la vortojn. „Eĉ GUto malGRANda konsTANte fraPANte….”. La postan tagon alia partoprenanto (ina), An, montris al Paŭlo sian komputilon. Sur la ekrano aperis teksto kun ruĝaj silaboj, tiuj, kiuj devas ricevi la akcenton. Li legis kaj, miraklo, la akcentoj aŭdiĝis. An, kiu kreis la programon, asertas, ke facile estas obteni aŭtomate tiujn kolorajn partojn en la vortoj. Ĉu tia programo helpos la esperantistojn, kies denaska lingvo ne konas tiajn akcentojn en la vortoj?

Post la staĝo Piret komentas:

Mi sincere dankas vin. Mi multe lernis pri la lingvo, sed eĉ pli pri instruado. Vi ne nur instruas la lingvon, vi instruas, kiel kompreni la mondon kaj homojn kaj kiel rimarki rilatojn. Interalie mi volas danki vin pro tio, ke mi rajtis paroli pri mia lando. Unue mi timis, ke mi ne kapablas rakonti sufiĉe interese kaj tiel forprenas la valoran tempon de vi, sed eble aliaj kursanoj tamen lernis ion novan.

Por komenti la vorton „kunspirado”, vi mirinde bele kaj bone kaptis la signifon. En la estona lingvo la subjektivo HING signifas ANIMON kaj HINGAMA estas la verbo SPIRI.

Mi aldonas la ĉefan ideon de la teksto, per kiu oni varbis nian XXV kantofestivalon en 2009 (La kantofestivalo nome havis la titolon „Kunspirado”.):

La komuna radiko ne estas hazardo... ĉar spirado kaj la animo rilatas. Spirante en unu ritmo kun iu, oni povas renkonti sian animon. Ĉi tiu magio

funkcias, kiam dekoj kaj miloj spiras kune.... En ĉi tiu festo ni renkontos kaj tiujn, kiuj kantis kaj dancis antaŭ ni... kaj niajn samtempulojn..... Kiam vi spiras kune, via komuna animo ĉeestas.



komuna kantado

Mirejo plu skribas:

Tute prave Piret parolas pri kunspirado okaze de kantado. En koruso ĉiuj kantistoj enspiras kune, elspiras kune. Tio estas tre valora aktivaĵo ne nur por la korpo sed ankaŭ por la psiko.



Mi volas mencii ĉi tie alian kunspiradon: tiun de la masaĝisto, kiu devas akordigi sian spirritmon kun tiu de la persono, kiu ricevas la masaĝadon. Iu premado sur iu akupunktura punkto okaze de ŝiacuo (japane 指圧, alilingve literumata kiel 'shiatsu' estas japana premmasaĝo) devas okazi dum elspirado de ambaŭ partoprenantoj, masaĝanto kaj masaĝato. Tiel la efiko de la masaĝo estas vere bona kaj saniga. Do kunspiri okaze de kantado kaj masaĝado estas konkretaj momentoj ĉe homgrupoj. La harmonia etoso okaze de laborado aŭ studado estas ne same konkreta, sed pli abstrakta. Ambaŭ bonvenas.

La ligoj inter kroata kaj ĉina literaturo

Intervjuo de Alessandra Madella kun Spomenka Štimec[4]



Spomenka Štimec estas Esperant-lingva verkistino el Kroatio. Ŝi estis sekretariino de la Esperantlingva Verkista Asocio, kiun fondis Tibor Sekelj en Budapeŝto en 1982, kaj ŝi estas nun membro de la Akademio Literatura de Esperanto. La internacia literatura organizaĵo Esperanta PEN konsideras ŝin inter la kvin plej elstaraj verkistoj indaj esti kandidatoj por la Nobel-Premio pri Literaturo. En 2021, por celebri la Zamenhofan Feston, kiu estas tradicie la Tago de la Esperanta libro, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponis simbolan tutmondan legadon de ŝia libro „Hodler en Mostar" (2006). En tiu ĉi unua parto de la intervjuo, ŝi priparolas siajn esploradojn pri la ligoj inter kroata kaj ĉina literaturo.

SŠ: *Spomenka Štimec*
AM: *Alessandra Madella*

AM: Kiam vi komencis vian esploradon kaj kolektadon pri la historio de Esperanta literaturo en Kroatio?

SŠ: Mi laboris profesie por Esperanto en Internacia Kultura Servo (IKS) ekde 1972 ĝis la milito en Kroatio, 1991, fakte ĝis 1994 kiam mi forlasis la IKSon kaj enposteniĝis en la ambasadejo de Malajzio en Kroatio. IKS eldonis librojn, mi vivis apud Esperantaj libroj kaj riĉa Esperanto-Biblioteko. Mia oficejo estis Esperanto-Klubo en Str. Amruševa 5. Tra mia oficejo promenadis la plej grandaj kroataj tradukistoj el/al Esperanto. Mi estis parto de ilia vivo, kaj ili de la mia. En 1978 mi ricevis en la UK de Varna en Bulgario premion por la novelo „Nepagipova lando" kaj mi eniris la Esperantan literaturon.

AM: Ĉu vi ofte persone vizitis aziajn landojn?

SŠ: Jes. Legu mian libron „Geografioj de miaj memoroj".

[4] Aperis en Ĉina Radio Internacia (2022-01-04, http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220104/726254.html)

AM: Kiu estis la unua traduko de la kroata literaturo al la ĉina lingvo? Kiun rolon ludis Esperanto en tio?

SŠ: La unua traduko de la kroata literaturo al la ĉina okazis en Ŝanhajo, kie funkciis la eldonejo Ŝangiru, en 1931. Temis pri la verko „Konfeso" de la kroata instruistino Milka Pogačić. Esperantigis ĝin la instruistino Antonija Jozičić kaj presigis proprakoste la Esperantan eldonon en eta urbo ĉe la bosnia landlimo, Kostajnica en 1913!!! La tradukistino partoprenis en la UK de Krakovo en 1912. (En mia verko „Hodler en Mostar" mi sidigis ŝin malantaŭ Hector Hodler dum la UK…). Mi ne scias, kiel la libro atingis Ĉinion. Tiutempe ĉinoj ne kutimis traduki frazon post frazo, de la tradukata libro, sed rakontis la enhavon de ĉiu ĉapitro. Tiel la tradukita teksto ne estas tro dika.

AM: Kiel vi komprenis, ke Vasilij Eroŝenko ludis rolon en tiu traduko?

SŠ: Mi demandis multajn ĉinojn, ĉu iu scias ion pri iu ĉina esperantisto Wang Luyan. Neniu aŭdis lian nomon. Neniu ĉino povis diri al mi ion pri li. Kaj tiam mi mem trovis spuron pri li en la interesega libro „Historio de Esperanto en Ĉinio". Tie mi vidis foton de Vasilij Eroŝenko kaj lia akompananto Wang Luyan dum la komuna vojaĝo… kaj mi konkludis, kiu puŝis Wang Luyan okupiĝi pri tradukado de slava libro al la ĉina. Ĉinoj ŝatis Eroŝenkon. Kiam li malaperis el la publika vivo, ĉar li forveturis al norda Kolima, ĉinoj en rusaj gazetoj publikigis anoncon, ke ili serĉas Eroŝenkon.

AM: Ĉu aliaj famaj libroj de la kroata literaturo estis tradukitaj al la ĉina en la unuaj jardekoj de la dudeka jarcento?

SŠ: La plej fama estas romano pri la konata kroata surĉevala ludo, kie oni ĵetas lancon por trafi ringon. Alka, estas la kroata nomo de ĝi. Oni ludas tiun ludon eĉ nuntempe, tre pompe, en festaj folkloraj vestoj. Tio estas granda turisma evento en la urbo Sinj. Pri iu ano de la ringludo la kroata verkisto Dinko Šimunović verkis romanon „Ano de l' Ringludo". Tiu romano estis esperantigita de d-ro Fran Janjiĉ kaj publikigita en Germanio en Lepsiko ĉe la eldonejo Ferdinand Hirsch und Sohn, 1926, ĉinigita fare de Su Fang Si kaj publikigita ĉe la sama eldonejo en Ŝanhajo en 1936. (Nun jam oni tradukis frazon post frazo.)

AM: Ĉu nur esperantistoj konscias pri tiuj ligoj pere de Esperanto inter la kroata kaj ĉina literaturoj?

SŠ: Tio estas iom konata kultura fenomeno en Kroatio. Sciis pri ĝi la politkisto Dražen Budiša, kiam li partoprenis ofican vojaĝon al la Ĉina

Parlamento. Li proponis, ke la donaco por ĉinoj estu represo de la traduko pri „Ringludo” en la ĉinan. Tiel nia modesta eldono el Ŝanhajo ricevis belan ŝtatan skatolon kun la kroata blazono kaj ĝi estis la oficiala donaco de la kroata delegacio al la ĉinaj kolegoj. Mi ne scias, ĉu iu alia Esperanta libro atingis tian „politikan karieron” kiel „Ano de l’ Ringludo”...

AM: Kiujn planojn vi havas por venonta libro aŭ esplorado pri kroata Esperanto-kulturo?

SŠ: Hu! Mi trovis ion mirindan en nia Esperanta biblioteko: granda estona poetino Hilda Dresen korespondis kun la kroata Esperanta poeto Josip Velebit duonjarcenton. Tio estas lirika historio… mi analizis centon da leteroj kaj finverkis hieraŭ nokte: „Hilda al Josip”.

Pri La Memoraĵoj de Julia Agripina – Intervjuo al Anna Löwenstein[5]



La fama brita verkistino Anna Löwenstein afable konsentis paroli kun ni pri sia lasta romano kaj pri siaj kursoj de verkado.
AL: *Anna Löwenstein*
AM: *Alessandra Madella*


AM: *Ĉu vi bonvolas paroli pri via lasta romano, LA MEMORAĴOJ DE JULIA AGRIPINA?*

AL: Temas pri Agripina, la patrino de la romia imperiestro Nerono. Mi komencis interesiĝi pri ŝi esplorante pri mia romano MORTO DE ARTISTO, ĝuste pri Nerono. Tiam mi komprenis, ke Agripina estas multe misprezentata de la romiaj historiistoj de tiu epoko. Modernaj historiistoj komencas rerigardi la situacion kaj kompreni, ke la vidpunkto de romiaj historiistoj ne vere akordiĝas kun la modernaj ideoj. Ili opiniis, ke ambicia aŭ potenca virino estas malbona virino. Sed en la nuna tempo, se virino volas aktivi en la politika mondo, ni ne plu pensas, ke ŝi havas ne-akcepteblan

[5] Fonto: http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220112/727941.html.
Publikigita: 2022-01-12

ambicion. Agripina edziniĝis kun la imperiestro Klaŭdio kaj ŝi kunlaboris kun li. Kiel oni vidis ĝin tiam, Klaŭdio estis sub la rego de sia edzino. Nun ni dirus, ke ŝi tre bone kunlaboris kun sia edzo. Ili havis komunajn ideojn kaj realigis ilin kune. Tiu nova rigardo al Agripina interesis min kaj mi volis verki romanon pri ŝi.

AM: *Kiel ŝi estis malsama ol aliaj romiaj virinoj de la sama epoko?*



AL: Ŝi certe ricevis tre bonan edukadon, same kiel aliaj virinoj de la imperia familio. Sed ŝi ne volis resti en la ombroj. Ŝi volis esti aktiva en la politika vivo, same kiel viroj. Ŝi ne estis kontenta de tiu rolo, kiun oni tiam asignis al virinoj. Ŝi volis mem esti videbla.

AM: *Laŭ kiom da voĉoj estis verkita la romano?*

AL: Ĝi estis verkita laŭ tri malsamaj voĉoj. Mi montras scenojn, kiuj ilustras diversajn momentojn de la vivo de Agripina. Ili estas verkitaj en la tria persono, laŭ ŝia vidpunkto. Krom tio, Agripina verkas siajn memoraĵojn en la unua persono. Sed aperas ankaŭ ŝiaj pensoj dum ŝi verkas la memoraĵojn, ĉar ŝi foje kaŝas la veron aŭ mem inventas ion. La legantoj povas vidi tion, ĉar ili legis ankaŭ la scenon, en kiu la afero efektive okazis.

AM: *Ĉu tiuj memoraĵoj de Agripina vere ekzistis?*

AL: Jes, la historiisto Tacito aludas al la fakto, ke ŝi verkis siajn memoraĵojn. Li citas kelkajn faktojn el ili, same kiel la verkisto Plinio la Pli Aĝa. La memoraĵoj ekzistis, sed ili ne travivis. Tio lasas tre oportunan truon por verkisto de historiaj romanoj, kiu povas mem verki por Agripina.

AM: *Ĉu estis evoluo en la maniero, en kiu vi verkas pri virinoj en viaj romanoj?*

AL: En la unua romano estis tre ordinara virino, kiu poste fariĝis sklavino. En ĉi tiu romano mi verkas pri virino, kiu fariĝis la edzino kaj la patrino de imperiestro. Estas tute alia socia klaso. En la dua romano, MORTO DE ARTISTO, la viro estas la rakontisto. Estas malfacile verki tiun romanon el

la vidpunkto de virino, ĉar virinoj malpli povis esti en la centro de agado, rilati kun la imperiestro kaj vidi ĉion, kio okazis.

AM: *Ĉu vi ĉiam pensas viajn romanojn rekte en Esperanto?*

AL: Ne, mi fakte verkis ilin en la angla. Sed mi konstatis, ke estas multe malpli facile eniri la angla-lingvan libro-merkaton ol la Esperantan. Nur la unua, LA ŜTONA URBO, aperis en la angla, dum ĉiuj tri Esperantaj versioj aperis kaj estas verŝajne multe pli sukcesaj ol ili iam ajn estus en la giganta angla-lingva merkato.

AM: *Kiel estas la traduka procezo de viaj romanoj?*

AL: Mi provas traduki ilin tre precize. Mia celo estas redoni precize la pensojn kaj la etoson de la originalo, eĉ iom ŝanĝante la precizajn vortojn.

AM: *Ĉu vi pensas, ke ankaŭ aziaj legantoj ŝatas viajn romanojn? Kiel?*

AL: Povus esti parte, ĉar mi uzas klasikan lingvaĵon. Verŝajne ili estas pli facilaj por ĉinaj aŭ japanaj legantoj. Krome, en LA ŜTONA URBO Bivana venas al Romo. Tiu kulturo por ŝi estas tute fremda kaj mi malpli faras supozojn pri tio, kion la legantoj jam scias, ĉar ŝi mem ne jam scias tion. Do eble tiu fremda kulturo iĝas pli facile enirebla por aziaj legantoj.

AM: *Kiu estas la kerna ideo de viaj kursoj pri verkado?*

AL: La ideo estas, ke oni disigu la du aspektojn: verkadon kaj redaktadon. La granda eraro, kiun aspirantaj verkistoj ofte faras, estas redakti tekston samtempe dum oni kreas ĝin. Fakte, tio ege malhelpas. Mi malkovris tiun rapidan verkadon dum mi legis librojn pri verkado en la angla. Mi provas prezenti ekzercojn, en kiuj oni verkas tre rapide kaj sen-redaktado kaj redaktas nur poste. Mi unue faris tion en Greziljono. La homoj tre ŝatis kaj volis daŭrigi ankaŭ poste. Do, ni kreis interretan grupon, kiu nomiĝas „8-minuta verkado". Ĉiu-semajne mi prezentas temon kaj la homoj devas verki pri ĝi por la posta semajno. Ankaŭ mia kurso pri literaturo dum la Itala Kongreso en Asizo ĉiu-matene komenciĝis per ekzerco: ok-minuta verkado.

AM: *Mi dankas vin.*

Esperanto por vigligi intereson pri la gepatra lingvo kaj pli efike lerni fremdan lingvon – Intervjuo al Elisabetta Vilisics Formaggio[6]



Elisabetta Vilisics Formaggio en la 80-aj jaroj faris unu el la plej gravaj eksperimentoj en Italio pri la lern-faciliga eco de Esperanto. En tiu ĉi intervjuo ŝi afable konsentis respondi al la demandoj de Ĉina Radio Internacia pri siaj spertoj.

AM: *Alessandra MADELLA*

EVF: *Elisabetta VILISICS FORMAGGIO*

AM: Kiel naskiĝis en vi la ideo fari eksperimenton ĉe la elementa lernejo Nicola Rocca de San Salvatore di Cogorno, en la provinco Ĝenovo, Italio, inter 1983 kaj 1988?

EVF: La ideo naskiĝis danke al la favoraj kondiĉoj:

En la jaro 1982 mia Esperanto-kurso por plenaĝuloj estis frekventata de du instruistinoj deĵorantaj ĉe la lernejo, kies nomon vi menciis. Mi sugestis al ili utiligi Esperanton en la lerneja laboro, kiel kompar-lingvon kun la gepatra. Ili bone komprenis la validecon de tiu ideo, sed ankoraŭ ne sentis sin pretaj al tia tasko. Ili proponis kunlaboron: se mi okupiĝos pri la instruado de Esperanto, ili prizorgos ĝian praktikan utiligon en la propra edukprogramo.

Mi akceptis la proponon. Sekvis du-jara fruktodona kunagado.

AM: Ĉu vi bonvolus priskribi al ni la eksperimenton? Kion vi celis mezuri kaj kiel?


EVF: Ni ne konsideris tiun ĉi iniciativon scienca eksperimento, ne estis ja nia intenco konfirmi aŭ rifuti iun hipotezon. Ni volis doni ian pluson al la lernantoj harmonie al la tradicia lernprogramo. Mi instruis Esperanton tra ludoj, praktikaj konversacietoj, legaĵoj, korespondado, direktante la atenton de la lernantoj ekde la komenco al lingvostrukturaj aspektoj: fonetikaj, grafikaj, morfologiaj kaj sintaksaj reguloj, kiujn la koleginoj uzis poste por

[6] Fonto: Ĉina Radio Internacia, 2021-09-22, http://esperanto.cri.cn/e-club/enjoyreading/4204/20210922/703547.html

plivigligi ilian interesiĝon pri la gepatra lingvo. En du jaroj la infanoj akiris konsiderindajn lingvajn konojn kaj kapablojn. Mi decidis dokumenti tion. Tiucele ni efektivigis diversajn skribajn kaj parolajn provojn kaj tiel nia iniciativo alprenis eksperimentajn trajtojn.

Post tio niaj gelernantoj daŭrigis siajn studojn ĉe la Mezgrada Lernejo de Cogorno kaj tie ili komencis lerni la francan lingvon (1985). Kiam ili finis la tri-jaran ciklon, tiam - kun la konsento kaj kun la partopreno de la instruisto pri la franca - ni adaptis niajn testojn al tiu lingvo. Komparante la rezultojn kun tiuj rilatantaj Esperanton, ni akiris datenojn pri la lernfacilecaj diferencoj. La speciala situacio instigis min al plia esplorado.

La gelernantoj de niaj iamaj Esperanto-klasoj en la mezgrada lernejo lernis en diversaj klasoj intermiksite kun aliaj geknaboj, kiuj ne lernis Esperanton. Tiuj ĉi lastaj partoprenis kune kun la unuaj en la fina testado. La komparado de la testrezultoj produktitaj de la du malsamaj kategorioj (kun kaj respektive sen Esperanto) permesis akiri ideon pri la propedeŭtika utileco de Esperanto por la posta lernado de la franca.



AM: Kiel vi realigis la projekton laŭ praktika vidpunkto?

EVF: Komence de la 1980-aj jaroj en la italaj unua-gradaj lernejoj ankoraŭ ne estis enprogramigita la deviga lernado de fremda lingvo. Estis ankoraŭ sufiĉe facile trovi tempon kaj disponeblon por la enkonduko de Esperanto laŭ elekto de la klas-instruistoj. Estis bezonata nur la konsento de la gepatroj de la koncernaj infanoj kaj tiu de la lernejestraro. Pri la akiro de tiuj konsentoj okupiĝis la du klas-instruistinoj. Mi ricevis la instrupermeson, kiel membro de la Itala Instituto de Esperanto, en kvalito de spertulo sensalajre kunlaboranta.

La programo daŭris du lernojarojn, de la 9-a ĝis la 11-a jaraĝo de la infanoj. Partoprenis proksimume 30 gelernantoj dividitaj en du paralelaj klasoj. La lecionoj pri Esperanto okazis unufoje semajne en la posttagmezo, eksterla normala lerneja horaro, kaj daŭris 90 minutojn. Entute temis do pri proksimume 80 plusaj horoj dediĉitaj al Esperanto dum la du lernojaroj, La kunligoj kun la gepatra lingvo kaj kun aliaj lernobjektoj okazis kadre de la kutima instrutempo fare de la du koleginoj.

Pro la manko de kontinueco kaj necesa dialogo inter la unua- kaj la dua-grada instrusistemo, en la mezlernejo, la antaŭaj lingvaj spertoj de la gelernantoj ne estis prikonsideritaj, kaj ties ebla propedeŭtika efiko ne estis konscie ekspluatita de la instruistoj. Mi pensis, ke la latentaj scioj povas porti tamen ioman avantaĝon en la studado de la franca lingvo. Scivole pri tio mi petis finan testadon.

AM: Kiel respondis la gepatroj?

EVF: La unuanima konsento de la gepatroj baziĝis sur ilia persona fido je la klas-instruistinoj, kiujn ili konis jam de tri jaroj. Ili akceptis la kromajn horojn kaj akompanis regule siajn gefilojn al la posttagmezaj lecionoj disvolvitaj de mi kaj regule partoprenataj de la koncernaj koleginoj.

AM: Kiujn internaciajn rilatojn vi disvolvis pere de tiu ĉi eksperimento?

EVF: Pro la limigita tempo disponebla mi devis rezigni pri rilatoj aparte engaĝaj. Mi elektis facile alireblajn kontaktojn kaj simplan korespond-teknikon: mi petis kelkajn miajn konatojn en diversaj landoj sendi al la adreso de la klasoj bildkarton pri sia loĝurbo kun mallonga kaj facil-lingva priskribo. La iom post iom alvenantajn salutojn ni kune legis, tradukis kaj reciprokis. La lingva parto estis kompletigita per geografiaj esploroj, per la praktika uzo de poŝtaj servoj kaj aliaj edukvaloraj kunligaĵoj.

Ni organizis plie Esperanto-tagon en la lernejo, en kiu partoprenis pluraj internaciaj familioj kun infanoj, vivantaj en Italio, krom franca-japana paro kun tri gefiloj. Tre bela sperto!

AM: Kiuj homoj kaj institucioj helpis vin?

EVF: La du klas-instruistinoj flegis la personajn kontaktojn kun la familioj kaj kun la lerneja medio, ili adaptis sian didaktikan programon al la projekto kaj memvole oferis 80-horan kromlaboron sen financa rekompenco. Sen tio mi estus povinta fari nenion.

La kolegino pri la franca lingvo en la mezlernejo akceptis nian peton kaj dediĉis du siajn lecionojn al la testado. Per tiu helpo ŝi ebligis la realigon de la esploroj.

Kiel institucion, mi mencias la Italan Instituton de Esperanto, kies nomon mi rajtis uzi ĉiufoje, kiam necesis pruvi la seriozecon de la iniciato. Mi proponis kaj disvolvis ja mian laboron en la rolo de estro de ĝia Ĝenova Katedro.

Domaĝe, por la prilaboro de testiloj kaj ilia aplikado, por la analizo kaj pritaksado de la rezultoj mi ne trovis helpon de spertulo, nek taŭgan modelon en la fakliteraturo. Mi klopodis fari ĉion per propra rezonado, sed dume mi sentis konstante la mankon de tiuj rilataj spertoj. Tio pezigis la taskon.

AM: Ĉu vi sciis ion pri aliaj italaj kaj/aŭ eksterlandaj eksperimentoj?

EVF: Jes. Mi legis pri pluraj kazoj priskribitaj en la pasinteco. Mi konis detale la du sinsekvajn internaciajn eksperimentojn de ILEI en la 1970-aj jaroj. Mi sekvis kun atento la admirindan laboron de gekolegoj en Italio (Giovanni Pala en Cagliari, Gianfranca Braschi Taddei en Cesena, Nicola Lasalandra en Bari, Mirko Marcetta en Sotto il Monte,...): ĉiuj iaspecaj eksperimentoj pri la lerneja instruado de Esperanto, ĉiuj apartaj kazoj kun malsamaj ecoj, ne kunordigitaj. Mi sciis pri la teorioj kaj la preparoj de propedeŭtikaj esploroj ĉe la Kibernetika Instituto en Paderborn (Germanio).

AM: Ĉu vi estis jam partopreninta en aliaj eksperimentoj?

EVF: Jes. Mi partoprenis en la tri-jara programo de la Kvinlanda Eksperimento, organizita de ILEI (1971-74), kun klaso de la Elementa Lernejo San Pier di Canne, Chiavari, kiu reprezentis Italion. El miaj spertoj tiu ĉi estas ĝis hodiaŭ la plej memorinda.

Mi havis okazon ankaŭ gaste labori ĉe Kibernetika Instituto de Paderborn, kie mi helpis pretigi aŭdvidan materialon por Esperanto-lecionoj.

AM: Kiel via eksperimento helpis al vi verki la lernolibrojn Ludu kun ni!*?*

EVF: La enhavo de tiuj lernolibroj maturiĝis en mia menso dum multjara instruado. Lude lerni signifas laŭ mi sin-amuze malkaŝi ludregulojn kaj konscie apliki ilin en la plua ludado. Tio estis la bazo de mia instrumetodo, se temis pri Esperanto. La *Ludu kun ni!*-libroj estas instru-helpiloj por havigi al la infanoj simplan kaj regulan komunikilon, tra kiu ili povas kompreni, interalie, kio estas kaj kiel funkcias lingvo. La esploroj efektivigitaj ĉe la lernejoj de San Salvatore di Cogorno sugestis, ke tiu komunika modelo

taŭgas por plifaciligo de posta lingvolernado eĉ en itala-franca rilato, tiel aldoniĝis la subtitolo „Propedeŭtika lingvo-kurso por infanoj”.

AM: Ĉu vi opinias, ke tia eksperimento estus pli facila aŭ pli malfacila hodiaŭ?

EVF: Mi timas, ke hodiaŭ ĝi estus multe pli malfacila pro organizaj malhelpoj.


AM: Ĉu vi havas konsilojn por homoj, kiuj ŝatus fari similan eksperimenton nun?

EVF: Objektivecon kaj prudenton!

Antaŭ ol proponi aŭ peti ion ajn de lernejaj instancoj, necesas prilabori tre seriozan, realigeblan, profesie kaj burokratisme akcepteblan planon kun eventualaj variantoj kaj havi klaran bildon pri propraj rimedoj.

El la landoj kaj sekcioj…

Barato



Alessandra Madella, vicprezidantino de ILEI, prelegis pri „La novaj ekzamenoj de Itala Instituto de Esperanto: testi kompetencojn kaj/aŭ kulturon” dum la 8-a internacia konferenco de Azia Asocio por Lingvo-testado (*Asian Association for Language Assessment, AALA*), kiu okazis ĉe Anna Universitato en Chennai, Tamil Nadu, Barato, de la 26-a ĝis la 28-a de oktobro 2022. Ŝi reprezentis Zaozhuang-Universitaton kaj ILEI. Ŝia raporto pri tiu interesa kaj bone organizita konferenco aperos en la venonta numero de IPR.

Surfote: Nakamura Keita de Fondaĵo Eiken (JP), Peter Kegan de Auckland-Universitato (AU) kaj Shrimathy Venkatalakshimi de Anna-Universitato, Chennai

Burundo



En septembro de la jaro 2019, post ĉiuj paŝoj postulataj de la Ministerio pri Nacia Edukado, la landa Esperanto-Asocio en Burundo, A.N.E.B. akronime, malfermis infanlernejon, nomatan „La Espero” en la Esperanto-Centro de Rumonge, kie troviĝas la sidejo de A.N.E.B. mem.

La unua jaro estis malfacile administrebla, ĉar la nombro de infanoj estis malalta, 9 infanoj entute. Sed nia instruistino klopodis kiel eble plej multe kvankam ŝi ricevis nesufiĉan salajron por instrui la infanojn. Jam antaŭ la apero de tiu ĉi infanlernejo, la loĝantaro de la distrikto Kanyenkoko estis feliĉa havi E-centron kun biblioteko en sia distrikto.

Ankaŭ la gepatroj de ĉi tiuj infanoj ĝojas vidi siajn infanojn en la lernejo en la aĝo de tri jaroj, kiam en Burundo, ĝenerale, ni kutimas vidi infanojn de ses aŭ sep jaroj iri en la bazan lernejon por komenci la unuan klason.

Post trijara laboro, nia infanĝardeno „La Espero” nuntempe havas 58 infanojn, tri instruistojn, direktorinon kaj unu gardiston. Ni fieras je tio, ĉar vidiĝas, ke la nombro de infanoj kreskas iom post iom.

La gepatroj estas malriĉaj pro la milito kaj ankaŭ pro la nuna situacio; tio signifas, ke ili ne alportas siajn infanojn multnombre kaj ni eĉ vidas iujn infanojn, kiuj forlasas la lernejon pro financaj problemoj aŭ malsano aŭ iu alia familia kialo. „La Espero”, nia infanlernejo, sekvas la nacian edukan programon de Burundo, sed ĉar ni volas, ke Eo evoluu kaj progresu, ni enmetis la Eo-kurson en la klashoraron de ĉiu semajno. Ni instruas la E-an lingvon por semi la lingvon en la kapon de la infanoj, kiam ili estas tre junaj (3-jaraj). Viaj konsiloj estas bonvenaj por bone atingi la celon. Ni eĉ bonvenigas eksterlandajn infanĝardenojn por korespondado kaj kunlaboro.



La infanĝardeno havas programon nutri infanojn unu fojon semajne kaj tio kuraĝigas infanojn daŭrigi la lernadon kaj eĉ la gepatroj aplaŭdas tiun agon. Se ni pliigus la nombron de nutrado al du aŭ tri fojoj, tio helpus nin varbi multe pli da infanoj de la kvartalo.

La infanĝardeno havas ludilojn en la korto de la lernejo (centro), por ke niaj infanoj ludu dum la paŭzoj; ni esperas, ke ni trovos donacantojn por altigi la nombron de ludiloj kaj tio ankaŭ faros, ke nia infanlernejo estu pli preferata de gepatroj; tio helpos por ke ni havu multe da novaj infanoj.

Pro la nombro de infanoj, kiu daŭre kreskas, kaj ĉar niaj instruistoj kutimas doni hejmtaskojn ĉiusemajnfine al la infanoj, la lernejo bezonas fotokopiilon por faciligi ilian taskon, kaj ĉi-lasta ankaŭ helpos en la laboro de la lerneja administrado por la presado kaj fotokopiado de raportoj. Tre baldaŭ mi dediĉos sufiĉan tempon por ekrilati kun A.N.E.B., nia Nacia Esperanto-Asocio en Burundo, kiu havas sian propran Centron, kie estas oficejo, ĉambro por vizitantoj, biblioteko kaj granda halo kun televidilo.

A.N.E.B. atingis tion, ĉar estas donacantoj, kiuj ĉiam pripensas helpi la agadon de la asocio kaj la asocio ĉiam pretas ricevi aliajn donacojn por bonege antaŭenigi la movadon en la lando. Ni ĉiam profitas la okazon danki ĉiujn pro la bonkoreco helpi finance, morale kaj konsile por la evoluigo kaj progresigo de nia kara lingvo Esperanto.

Hassano NTAHONSIGAYE

Italio

Raporto pri la katedro de Esperanto de Trento kaj Bolzano

Mi, subskribanta, Cescotti Norma Covelli, estrino de la katedro de Trento kaj Bolzano (Italio), instruas la Esperantan lingvon ekde la jaro 1986, tuj post kiam mi ricevis de la Itala Istituto de Esperanto la ateston de kvalifika kapabligo por la Esperanta instruado. De tiam mi pretigis multnombrajn lernantojn por la ekzamenoj de la unua kaj dua niveloj.

Nuntempe mi gvidas la Esperantajn kursojn proponitajn de la Itala Esperanto-Federacio, kun la oficeja permeso de la Itala Istituto de Esperanto. Ili komenciĝis en novembro 2021 sur nia regiona platformo (info@esperanto.trento.it) kaj daŭris ĝis la duono de februaro post la fino de la dek kvin lecionoj proponitaj komence; ok lernantoj partoprenis en la kursoj sed poste, iom post iom la nombro malpliiĝis kaj je la fino el ili restis nur kvar, kiuj deziris daŭrigi la lernadon.



La kursoj, do, pluiris dum la tuta somero, senpaŭze, ĝis la oka de oktobro 2022, kiam okazis la fina ekzameno. Bedaŭrinde nur du lernantoj subtenis tiun kaj obtenis bonegan sukceson.

Intertempe, je la fino de decembro 2021, komenciĝis ankaŭ la kurso pri la dua nivelo, kiel okazas preskaŭ ĉiujare en nia regiono. Ankaŭ tiu kurso, sekvata de du lernantoj, pluiris ĝis la ekzamenoj de oktobro. Ankaŭ tiuj du kandidatoj akiris bonegan sukceson. Do, oni povas diri, ke nia katedro ankoraŭ funkcias sufiĉe bone!

Nun mi atendas la komencon de kursoj proponitaj eĉ ĉi-jare de F.E.I. por la unuagrada nivelo, al kiuj oni aldonas ankaŭ alian de la duagrada nivelo. Ĉiuj kursoj komenciĝos la 14-an de novembro 2022 laŭ la sama sistemo. Pro tio estis jam alvenintaj al I.I.E. du aliĝoj por la unua nivelo kaj kvin por la dua. Mi opinias, ke tio favore aŭspicias kaj, esperante estontece la saman rezulton, samideane kaj kore mi salutas vin

Norma CESCOTTI COVELLI

Kroatio

La kvina kunveno de Erasmus+ projekto en Glasgovo[7]



Tri reprezentantoj de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac (Marija Jerković, Roberto Maglica kaj Josip Pleadin) restadis en la lasta kunveno de partneraj organizaĵoj de la Erasmus+ projekto „Reta edukado nun" komence de oktobro 2022 en Skotlando. Dum la kunveno estis pritraktitaj konkludoj pri la projekto, kiu komenciĝis fine de 2020 kaj okazadis en tre malfavoraj kondiĉoj pro la koronvirusa pandemio. Post la kunvenoj en Đurđevac meze de 2021, Bjalistoko (Pollando) en decembro 2021, Tuluzo (Francio) en marto 2022 kaj Piani di Luzza (Italio) en aprilo 2022, okazis la fina kunveno en Glasgovo (Skotlando) inter la 30-a de septembro kaj 4-a de oktobro 2022, kiu samtempe estis la lasta en Britio post ĝia eliro el Eŭropa Unio. La projekton „Reta edukado nun" aprobis la pola Agentejo por movebleco kaj programoj de Eŭropa Unio. La kunordiganto de la projekto estis Bjalistoka Esperanto-Societo, kaj partneris Esperanto-kultur-centro el Tuluzo, Bunta

[7] Fonto: https://novo.dec-kroatio.hr/eo/2022/10/12/peti-susret-erasmus-projekta-u-glasgowu/

Esperanto-Asocio el Bolonjo, Kosmo-strategio el Edinburgo kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac.
Dum kvin partneraj kunvenoj estis pritraktitaj temoj pri arkivado, ciferecigo de presitaj materialoj, aŭtoraj rajtoj, hibridaj prelegoj, subtekstigo de filmoj, komuna eŭropa referenckadro por lingvoj kaj diversaj teknikaj postuloj por realigo de reta kaj distanca edukado.

Madagaskaro

En Madagaskaro, la planita Esperanto-lingvoekzameno de Itaosy Esperanto-Klubo finiĝis antaŭ kelkaj tagoj, kun disdono de atestiloj al la sukcesintoj en la ĉeesto de la veterana e-istino Lala J. R., la 20-an de aŭgusto 2022.
Per afiŝoj en la kluba fejsbuka paĝo, la ĉeforganizinto de la aranĝo, Henriel Fidilalao Firaisana prezentis la ekzamenrezultojn kaj malkaŝis la nomojn de la sukcesintoj.
Oni tiel notas 4 sukcesintojn el 6 kandidatoj, kiuj trapasis ekzamenon ĉe la nivelo baza, laŭ kriterioj de IEK.



Okupis la 1-an ĝis la 4-a rango respektive Ranja, Erica, Ny Ando kaj Tatiana.
Tiujn ĉi atingojn ebligis ĝenerala preparkurso, en kiu partoprenis ĉirkaŭ deko da gejunuloj la 6-an de aŭgusto 2022 en Antoetra Ambohidrapeto kun financa subteno de la UEA-programo „Ni Semas”.
La celo nun estas „kuraĝigi ilin sur la vojo al plena esperantisteco”, komentis Henriel.
Klopodoj jam estas farataj por pli interesi ilin pri la junulara movado enlanda kaj por certigi la glatan funkciadon de la Esperanto-movado en la venontaj jaroj.

Adjévi Adjé

Subtenu la Koleghelpan Kason de ILEI!

Tiu kaso membrigas instruistojn, instruantojn kaj edukistojn el malpli pagipovaj mondpartoj. Pli da rimedoj por la Kaso permesus al ILEI reteni kaj protekti kelkajn sekciojn kaj altigi la rangon de Kontaktpersonoj al la pli dezirinda kategorio 'reprezentanto'.
Viaj donacoj bonvenas al *ilei.kasisto@gmail.com*.
Pri pag-manieroj, vidu fine de IPR.

La projekto EToSo

Tibor Sekelj refoje inter esperantistoj

La unua ideo, kiu vekiĝas ĉe mencio de la nomo de Tibor Sekelj, estas Esperanto, ĉar Esperanto estas nedisigeble ligita kun lia esto. Mondvojaĝanto, esploristo, etnologo, verkisto, aventuristo – en ĉiuj roloj kiuj plenigis lian vivon, Sekelj estis esperantisto. Kun Esperanto en la kofro li konkeris Akonkagvon, amikiĝis kaj konatigis nin kun Kumeŭaŭa, kolektis siajn ĉielarkojn kaj vizitis sian farmon. Kun Esperanto en la kofro, li malfermis la pordon de Nepalo kaj multajn aliajn pordojn. Kaj ĉie li instruis Esperanton. Do ne hazarde lia nomo titole ornamas la projekton ĝermintan en Irano, kiu konsistas el retkursoj de Esperanto okazigataj por diversaj lingvokomunumoj tra la tuta mondo. Pri tio ni interparolas kun Renato Corsetti kaj Ahmad Mamduhi, motoroj de la projekto.


RC – Renato Corsetti
AM – Ahmad Mamduhi
RP – Radojica Petrović

RP: Kiel naskiĝis la ideo de la Esperanto-kursaro „Tibor Sekelj"? Kiel kaj kiam la projekto startis?


RC: Kiam ekestis la pandemio, ĉiu devis reorganizi siajn agadojn. Miaj ĉeestaj kursoj en Londono de semajno al alia komenciĝis eksperimente per skajpo kaj poste per *Jitsi* kaj poste per *Zoom.* En tiu momento la Irana Esperanto-Asocio devis solvi la problemon pri sia nacia kongreso, kiu okazis virtuale kaj donis al multaj la ideon, ke virtualaj kunvenoj eblas.

Por la kongreso ĝi akiris tre potencan konton ĉe Zoom kaj post la sukcesa kongreso sin demandis, kion fari per ĝi. Kvankam multaj individuoj kaj asocioj petis utiligi ĝin, ĝi restis neuzata dum longa tempo dum la semajno. Tiam en interparoloj inter mi kaj Ahmad ekestis la ideo uzi ĝin por kursoj de Esperanto. Laŭ mia memoro la ideo pri la nomo Tibor Sekelj venis de Ahmad.

AM: Fakte antaŭ jaroj dum dek semajnoj mi dekfoje intervjuis karan Renaton; ĉiufoje dum preskaŭ horo, fine de kiu ankaŭ aliaj ĉeestantoj povis demandi lin. Ĉiufoje, krom alispecaj demandoj, mi petis lin diri siajn rememorojn, vidpunktojn kaj opiniojn pri granda esperantisto. Unu el tiuj pridemanditaj famaj esperantistoj estis karmemora Tibor Sekelj. Mi kredas, ke sekve/inspirite de liaj sennombraj Esperanto-agadoj, speciale de tiom multaj kursoj en ege diversaj mondopartoj, ni decidis nomi la projekton „Esperanto-kurso Tibor Sekelj”, nun mallonge EToSo.



Esperanto-kurso gvidata de Trevor Steele



Esperanto-kurso gvidata de Renato Corsetti

RP: Kiuj estas viaj motivoj kaj streboj en la projekto?

RC: Disvastigi la lingvon kaj la ideojn de Zamenhof en mondo, kiu ĉiam pli iras la malan vojon. Fari tion, kion multaj nuntempe timas fari. Paroli pri Esperanto al neesperantistoj kaj instrui al ili la lingvon. Sen tio niaj membronombroj kaj ĉefe parolantonombroj daŭre falos. Mi komprenas, kial esperantistoj ne estas entuziasmaj varbi pri Esperanto post sennombraj rifuzoj kaj primokoj [*Al kio utilas Esperanto? Lernu la lingvon de la fortuloj. Idealoj ne plu estas laŭmodaj en ĉiam pli individuisma mondo* ktp.] Sed la praktiko montras, ke el 100 homoj, kelkaj, 3 aŭ 5, estas idealismaj kaj aŭskultas nin. Do, necesas paroli al 100 por havi tri kursanojn, sed sen tiuj tri kursanoj la movado estas sur la vojo de malapero.

AM: En la nuna ĉiu-tage pli virtualiĝanta mondo, kial ankaŭ niaj kursoj ne fariĝu virtualaj? Virtualaj kursoj havas multajn avantaĝojn rilate al la tradiciaj ĉeestaj kursoj, ekz-e fizika frekventado al kursejo ne bezonatas (jen ankaŭ medi-protekta ago), la lecionoj multe pli facile povas reĝistriĝi ĉu por re-spektadoj fare de la lernantoj, ĉu fare de ekster-kursaj lernontoj kiam ajn el kie ajn tra la tuta mondo, … Tio signifas atingigi lerneblecon de Esperanto

al ĉiu, kiu deziras lerni ĝin kie ajn kaj kiam ajn dank' al la registraĵoj de la kursoj. Kiam iu kontaktas min kaj demandas pri kurso de Esperanto, mi facile diras, ke tiu povas spekti registraĵojn de la jam okazintaj lecionoj de la kurso kaj - se eble - aliĝi al nia kuranta kurso.

RP: Kiel vi koncize priskribus la projekton?

RC: Projekto por varbi kursanojn por reta kurso de Esperanto en lingvo, kiun ili komprenas bone, kaj por instrui per vivanta instruisto, kiun oni povas demandi tuj kaj de kiu oni povas havi respondon. Tio estas unu el la limoj de la retaj kursoj sen instruisto, el kiuj kelkaj estas tre bonaj, sed kiuj ne permesas tuj demandi veran homon pri evenualaj duboj. La lasta demando de lernanto en Duolingo, kiun mi ĵus ricevis, estas: Duolingo diras, ke oni diru „Pluvo falis" kaj ne „La pluvo falis". Kial?

AM: La ĉefa celo de la projekto estas tio, ke se iu ajn homo ekscias pri Esperanto kaj deziras eklerni ĝin en sia etna lingvo, tiu povu trovi niajn retkursojn ĉu okazintajn (registrite) ĉu okazantajn aŭ okazontajn. Mi esperas, ke en la sama retpaĝo, kie oni lernas nian lingvon per la registraĵoj, oni povu ankaŭ skribi siajn demandojn, por ke (ideale) la instruisto mem, aŭ alia esperantisto respondu ilin.

Komence kaj/aŭ antaŭ la kurso povas okazi – kaj jam okazis en iuj kazoj – reta prezentado de Esperanto kaj ties unikaj karakterizaĵoj kaj aplikebloj.

RP: *Kiaj estas la perspektivoj de inkluzivigo de novaj instruistoj kaj novaj lingvoj?*

RC: La perspektivoj estas rozkoloraj, se ni nur sukcesas konvinki esperantistojn marŝi en la ŝuoj de Zamenhof kaj sinteni kiel Tibor Sekelj, kiu iris ankaŭ al Nepalo por porti Esperanton. Kial la nepalaj esperantistoj ne daŭrigu tion per la kelkaj nepalaj lingvoj?

Mi scias, ke la nepalaj komercistoj pri la angla reagos per primokoj kaj insultoj kaj per logado de homoj al teoria ebleco, ke junulo en nepala vilaĝo povos labori en Nov-Jorko. Temas evidente pri permesataj vendomensogoj.

AM: Verŝajne ekzistas ĉ. 7 mil etnaj linvoj, el kiuj ĉ. 300 havas Vikipedion; tio signifas, ke almenaŭ 300 lingvoj havas alfabeton, en kiuj estas sufiĉe multe da parolantoj, kiuj ĝuas ankaŭ komputilan kaj interretan kapablojn. Sekve, teorie, almenaŭ en tiom da lingvoj potenciale eblas havi Esperanto-prezentadojn kaj -kursojn!

RP: *Kia estas la procedo de startigo kaj realigo de unuopa Esperanto-kurso? Daŭro?*

RC: Havi instruiston kun sperto pri instruado de Esperanto en sia lingvo kaj kun komputilo. Havi Esperanto-asocion, kiu pretas pagi malgrandan sumon por reklami en la reto. [La itala asocio pagis 150 eŭrojn kaj trovis centon da potencialaj interesiĝantoj pri kurso]. Kontakti ILEI-n kaj interkonsenti kun Ahmad pri la momento, kiam la Zoom-konto estas je dispono. Nenio alia estas bezonata. La instruisto mem elektu sian metodon kaj siajn materialojn.

AM: Ĉiu, kiu sentas en si kapablon instrui Esperanton – do ĉu instruisto, ĉu instruemulo – povas kontakti nin por okazigi tian virtualan kurson ĉu en sia etna lingvo, ĉu en alia lingvo, per kiu li/ŝi povas instrui Esperanton, ĉu en Esperanto mem; en la lasta kazo, povas temi pri aŭ dekomenca kurso per universala aŭ nurEsperanta metodo utiliganta ĉefe bildojn, filmojn k.s., aŭ pri meznivela/progresiga kurso por la jamaj (komencintaj) esperantistoj. La daŭro de la kurso aŭ de ĉiu leciono tute dependas de la kurs-gvidanto mem kaj de lia/ŝia instru-metodo kaj -materialo.

RP: *Kiunivelaj estas aŭ povas esti la kursoj?*

RC: Nun ni havas ĉiujn nivelojn de absolutaj komencantoj en la araba ĝis la nivelo C1 por azianoj, instruata de Trevor Steele.

AM: Jes, fakte povas esti – kaj estas – ĉiunivelaj kursoj. Foje kara profesoro Dennis Keefe proponis, ke ni aldonu al la projekto EToSo ankaŭ per-Esperantajn kursojn pri diversaj fakoj, ekz-e instruadon de psikologio aŭ arto en Esperanto. Ni jam havis multnombrajn atelierojn pri origamio, kiun gvidis kara sinjorino Larysa Osadchuk, kaj kiun partoprenis eĉ neesperantistoj el tre diversaj landoj kaj lingvoj, multaj el kiuj ĉi tiel eksciis pri Esperanto kaj iuj eĉ eklernis Esperanton, iam helpe de Larysa mem dum la unuaj 15 minutoj de la atelieroj. Registraĵoj de ŝiaj atelieroj pri origamio estas spekteblaj ĉe https://www.aparat.com/playlist/529858.

RP: *Kiuj lernolibroj kaj aliaj kursmaterialoj estas uzataj?*

RC: Ĉiu instruisto decidas depende de la materialoj haveblaj en la uzata lingvo. Kelkaj instruistoj kiel mi mem [nivelo B2] kaj Trevor [nivelo C1] mem kreas la materialon el pluraj fontoj kaj sendas ĝin al la lernantoj per ret-mesaĝoj.

AM: Ni havis instruistojn, kiuj instruis laŭ/per sia libro, ekz-e karan prof. Nino Vessella, kiu instruis Esperanton per la svahila/sŭahila lingvo laŭ sia eldonota verko – feliĉe nun la libro estas eldonita. Mi en diversaj kursoj utiligis/as diversajn librojn kaj metodojn, ekz. iam mian libron La Plej Facila Lingvo de la Mondo, iam la faman libron de kara Stano Marĉek, Rekta Metodo, iam la verkon de kara Pierre Louis, Junul-kurso kaj en iuj okazoj du librojn paralele kaj en multaj okazoj utiligante ankaŭ retajn vide(et)ojn kaj artikolojn, pleje el uea.facila, kies retejon prizorgas kara Anna Löwenstein.

RP: *Ĉu / Kiel estas kontrolata la kvalito de la kursmaterialoj kaj kursoj mem?*

RC: Ni ne havas veran proceduron por kontroli la kvaliton de la instruado kaj nur elektas zorge konatajn instruantojn. Lastatempe oni komencis enkonduki la vizitojn al la kursoj de eksteraj gastoj, kiuj konversacias kun la lernantoj en Esperanto kaj povas konstati ties nivelon. La afero bone funkciis, ekzemple pri la kursoj en la rusa.

AM: Mi kredas, ke la instru-kvalito kaj la kompetenteco de la instruisto/instruanto mem decidas pri tio, ke la kurso estos sukcesa aŭ ne – daŭrigota aŭ ne! Ĉar, kiel oni diras ankaŭ en multaj aliaj terenoj, „kontentaj ‘klientoj’ mem varbas la postajn klientojn!”

RP: *Ĉu la kursoj finiĝas per ekzamenoj? Kiu eldonas atestilojn, se?*

RC: Jes, oni komencis enkonduki retajn ekzamenojn fare de ILEI-funkciuloj por tiuj okazoj, en kiuj la lernantoj je la fino de la kurso ne decidas alfronti la KER-ekzamenojn. La sistemo estos pli formaligita en la revizio de la regularo de la ILEI-ekzamenoj.

AM: Ni jam eldonas divers-specajn atestilojn, ekz-e por tiuj, kiuj dum la menciitaj horoj kaj tempo „trapasis sukcese ekzamenon”, aŭ „partoprenis kurson” aŭ „sukcese komencis lerni Esperanton”. Pli formalaj ILEI-ekzamenoj kaj atestiloj de ILEI/UEA estos atingeblaj post kiam ni (UEA kaj ILEI) rekomencos tion – jam teamo estas elektita de ambaŭ organizoj por realigi tion: ekz. vi mem, kara Radojica, estas en la teamo de ILEI.

RP: *Kiuj estas favoraj cirkonstancoj por la kursaro?*

RC: Instruisto kun la ĝusta personeco por amikiĝi kun la grupo. La grupo de lernantoj, laŭ mi, ne estu pli granda ol 10-15, ĉar ne eblus en unu horo paroligi ĉiujn.

Malfavoraj cirkonstancoj estas la manko de stabila ret-konekto en la lando. Tio ofte okazas en Afriko, kie pluraj kursoj retaj estas farataj per Vacapo en telefonoj.

AM aldonas: Feliĉe eĉ en tiaj okazoj la projekto jam funkcias, ekz-e kara Fransoazo Noireau jam delonge estas instruanta ĉefe per Vacapo kadre de la Esperanto-kursaro Tibor Sekelj.

AM: Ĉio povas okazi (tute) virtuale: informado pri Esperanto kaj varbado de lernontoj, kursoj, ekzamenoj kaj eĉ atestiloj. Tio, i.a. inkluzivas ankaŭ efikajn medi-amikajn agojn kaj sekvojn: ĉu rilate al la arboj, kiuj devus malaperi por produkti paperon, ĉu rilate al la CO2, kiu enirus la atmosferon de nia jam poluita planedo pro la fizika frekventado de instruistoj kaj lernantoj pere de fosiliaj hejtaĵoj, ĉu rilate al la tempo- kaj energi-perdo de la instruistoj kaj lernantoj dum la frekventado kaj la sekvanta plipezigo de la surstrataj trafikoj…!

RP: *Kiujn problemojn kaj obstaklojn renkontas la projekto? Solvoj?*

RC: Esperantistoj en kelkaj landoj tre rezignacie akceptas la malfacilaĵon varbi por Esperanto kaj eĉ ne plu provas. La solvo estas tre malfacila, ĉar ofte dependas de la situacio en la lando. Universitata gvidanto de kurso pri Esperanto en Ĉinujo raportis: „Ĉi-jare la kurso estis malsukcesa, ĉar nur 91 studentoj alfrontis la ekzamenon". Nederlanda kursgvidanto kun tia rezulto petus la premion Nobel pri instruado de Esperanto. Afrikaj gejunuloj estas tre entuziasmaj pri Esperanto, ĝuste ĉar ili esperas ŝanĝi sian situacion, dum en kelkaj mondopartoj oni ne plu esperas. Certe se ĉiuj Esperanto-oranizaĵoj kunlaborus por provi ŝanĝi la etoson en la movado, ĉefe en Eŭropo, io povus okazi.

AM: Sufiĉe rapida kaj stabila retkonekto kun akceptebla prezo ne ĉie – aŭ ne ĉiam – estas atingebla, dum jam delonge diversaj landoj, entreprenoj kaj eĉ homoj promesas (eĉ iam) tute senpagan kaj ĉie utiligeblan interreton! Mi kredas, ke se tio okazos, ni vidos alian akceladon en nia movado, precipe en multaj landoj de Afriko kaj Azio – similan al akceladoj, kiuj okazis sekve de ekapero de interreto kaj … de la pandemio!

RP: *Kio okazas kun finintoj de la kursoj? Ĉu / Kiel ili estas plu sekvataj kaj stimulataj al plulernado kaj enmovadiĝo?*

RC: La ĉeesto de la instruisto mem estas vivanta maniero de informanto pri la movado, ĉar movadaj tekstoj ofte estas uzataj en la kurso. Je la fino de la kursoj oni konsilas resekvi la kurson [mi faris tion kelkajn fojojn, se la atingita nivelo ne ŝajnis ĝusta] aŭ transiri al aliaj superaj kursoj, kie ili ekzistas. Mi havis problemojn forŝovi la lernantojn al la granda reta maro de Esperantujo, tamen pri duono mi pensas, ke mi sukcesis.

AM: Fakte allogo de instruisto – kaj/aŭ tio, kion li diras aŭ instruas – povas esti ia fiksilo por la lernintoj al la postaj kursoj kaj al la movado: mi vidis/as gelernantojn de kara Renato, kiuj deziras repartopreni en liaj samaj kursoj, ĉar ili ne akceptas ne plu ĝui liajn interesajn kursojn! Mi persone dum miaj kursoj konatigas i.a. interesajn kaj utilajn retejojn al la lernantoj, ekz. uea.facila, EventaServo, Tatoeba, Vikipedio, ReVo kaj PIV (vortaro.net), por ke ili kaj ĝuu allogajn legaĵojn kaj plialtigu sian lingvo-nivelon kaj eĉ, se eble, kontribuu al tiaj diversaj retpaĝoj.

RP: *Viaj impresoj kaj pluesperoj / timoj?*

RC: Mi lernis multe pli de miaj aziaj kaj nun afrikaj lernantoj pri la funkciado de Esperanto ol ili lernis de mi, ĉar ili konstante prezentis al mi problemojn, pri kiuj en Eŭropo ni eĉ ne pensas, ekzemple pri la malfcilaĵo uzi la diablan vorton „ke". Por konstati ĝian diablecon, sufiĉas rigardi kiom da signifoj ĝi havas en PIV, kaj pensi kiel parolanto de izola lingvo povas lerni uzi ĝin. Kompare kun tio, la diabla „po" estas ludo por infanoj.

AM: En iuj kursoj, min vere mirigas la alta rapido, laŭ kiu la lernantoj tiom bone lernas nian lingvon; tiel, mi komprenas, kial en lingvoj A kaj B okazas tio, sed en lingvoj C kaj Ĉ tute male, dum en lingvoj E kaj F io meza inter ili! Tio pruvas al ni, ke depende de la L1 (gepatra lingvo) de la Esperanto-lernantoj ni bezonas tute diversajn hor-nombrojn por samnivelaj kursoj.

RP: *Kiun demandon vi ne ricevis dum la intervjuo, sed ŝatus respondi?*

RC: Mi ŝatus aldoni: Longan vivon al Ahmad, al la iranaj esperantitoj kaj al ILEI!

AM: Mi elkore kaj forte deziras longegan kaj tute sanan vivon al kara Renato, en kies virtuala naskiĝtag-festo en 2021 multegaj homoj el tute diversaj landoj, kontinentoj kaj socitavoloj – kiel mi mem – dankis lin pro liaj sindonemaj kaj inspiraj helpoj kaj kuraĝigoj! Ankaŭ apartan dankon mi


deziras direkti al vi, kara Radojica, sen kies helpo mi ne povus ion fari efike kadre de ILEI. Sanon kaj pli da sukcesoj!

RP: *Dankon al vi!*

Danko kaj plupensoj

Dankon al Ahmad kaj Renato pro ilia kunlaboremo por la intervjuo, kaj multe plian dankon pro ilia laboro, el kiu nur ero estas la projekto EToSo subtenanta la Esperanto-disvastigan mision de ILEI. La saman atenton kaj subtenon de ILEI meritas ankaŭ aliaj retkursoj dise tra la mondo, kiuj ne viciĝis formale sub la tegmenton de EToSo, sed funkcias samcele.

La respondoj en ĉi tiu intervjuo malfermas multajn novajn demandojn, pri kiuj indas plu interparoli kaj prezenti la respondojn ne nur al la legantaro de IPR, sed pli vaste. La bela tradicio de ILEI-forumoj meritas sesion pri EToSo. Ĉu ni povas esperi specialan atelieron, dezirinde ankaŭ kolokvon pri la projekto dum la venonta kongreso de ILEI? La praktikaj spertoj kaj novaj metodikaj konoj el la kursaro „Tibor Sekelj" meritas lokon en Esperanta didaktiko por klarigo, ĝeneraligo kaj plia praktika uzo.



Alvoko de la 56-a ILEI-Kongreso

Tempo: Ekde la 5-a ĝis la12-a de aŭgusto 2023

Loko: Linjano Orsabla (Itale: Lignano Sabbiadoro), Italio

Ĉef-temo: „Instrui Esperanton en lernejoj”

Retejo: https://2023.kongreso.org/

Aligilo: https://2023.kongreso.org/alighilo.php

Rekta ligilo por informpaĝo: https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php



Post tri sinsekvaj nur-virtualaj Kongresoj, en 2023 la 56-a Kongreso de ILEI denove okazos ankaŭ en ĉeesta medio en la belega urbo Lignano Sabbiadoro en Italio, ĉe la strandurbo Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro) situanta mezvoje inter Venecio kaj Triesto, en ampleksa Kongresejo, kiu permesos al ĉiuj kongresanoj loĝi, manĝi, labori kaj ankaŭ ferii en la sama feria vilaĝo.
La kongresejo disponas, kaj senpage disponigas al la kongresanoj, privatan plaĝon, akvoparkon, olimpikan naĝejon kaj plurajn altrangajn ekipitajn sportajn spacojn ĉu kovritajn ĉu malfermajn.
La ĉefa temo de la Kongreso estos: „Instrui Esperanton en lernejoj”. La kongresa ĉeftemo certe vekos la intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj, universitataj esploristoj kaj profesoroj, ĵurnalistoj kaj de ĝenerala publiko; unuvorte de ĉiuj, kiuj iel dediĉas sin al la temo, ĉu profesie, ĉu ne.
Ni atendas vian aliĝon kaj viajn kontribuaĵojn ĉu pri la kongresa temo, ĉu pri aliaj pedagogiaj temoj, ĉu por la Lingva Festivalo, aŭ por la Internacia Vespero, ktp. Vi povas sciigi al ni viajn proponojn kaj kontribuaĵojn kaj en la Aliĝilo kaj per retmesaĝo al: ilei.kongresoj@gmail.com.

La limdato por sendo de la proponataj kontribuaĵoj estas la 31-a de januaro 2023, por ke ili certe estu aldonitaj al la provizora programo de la Kongreso.

Por ĉiu via kontribuaĵo, ĉu prelego aŭ ali-speca kontribuaĵo, bonvolu sendi al ni (ilei.kongresoj@gmail.com):
- titolon de la kontribuaĵo
- vian kompletan nomon
- daŭron de la prezentado
- ĉu vi prezentos ĉeeste aŭ rete
- du- ĝis maksimume kvin-linian priskribon de la kontribuaĵo
- du- ĝis maksimume kvin-linian biografion de vi
- vian foton

Kiel kutime, vi povos ĝui ankaŭ ekskursojn, Lingvan Festivalon, spektaklojn ktp.
Vi trovos ĉiujn detalojn pri aliĝo en la kongresa retejo: „2023.kongreso.org”
Bonvolu memori, ke la malplej kosta aliĝkotizo validas ĝis la 31-a de decembro 2022. Do bonvolu tuj aliĝi por ne atendi la duan periodon de la kotizo.

Laura BRAZZABENI, ILEI-Estrarano pri kongresoj

***Esperanto per rekta metodo* - Stano Marček. Ilustris Linda Kuruc-Marček. Eldonejo Stano Marček. Martin, 2013. 110 paĝoj, 25 cm. ISBN 9788089312276. Prezo 8,40 €.**

Ekzistas multaj metodoj por lerni kaj instrui lingvojn. Unu el la plej efikaj estis la tiel nomata „rekta metodo”. Tio estas la metodo, per kiu niaj gepatroj instruis al ni nian gepatran lingvon. Sen tradukado kaj sen gramatikaj klarigoj ili instruis al ni rekte pensi en nia lingvo.

Mi prezentos al vi mian riĉe ilustritan lernolibron *Esperanto per rekta metodo*. Ĝis la fino de la jaro 2020 ĝi aperis jam en 45 lingvoj (la angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hindia, hispana, hungara, indonezia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, brazila portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama – kaj ankaŭ en Esperanto).

La 22-leciona studmaterialo baziĝas sur la rekta metodo. Ĝeneralaj reguloj de la lingvo estas prezentataj per bildoj kaj simplaj frazoj, tiel ke la lernantoj sub-konscie ricevas la klarigojn de la novaj elementoj. Poste – en tekstoj kaj ekzercoj – ili rerenkontas tiujn novajn elementojn kaj ekzerciĝas pri ili, ĝis ili uzas ilin tute nature. Rande de la paĝoj aperas bildoj por prezenti la novajn vortojn. Se la jam konataj vortoj ebligas klarigi la signifon de tiuj novaj, aperas en la paĝ-randa bildvortaro klarigo en Esperanto.

Fine de ĉiu leciono aperas la sekcio Gramatiko. Tie per nacilingvaj klarigoj oni prezentas la regulojn, kiujn la lernantoj jam komencis subkonscie kompreni.

La lernolibra vortoprovizo respektas la oficialan ofteco-liston rekomenditan de la Akademio de Esperanto por ĉiuj lernolibroj de Esperanto (*Baza Radikaro Oficiala*). Ĝi prezentas 750 vort-elementojn, komencante de tiuj plej ofte uzataj. Tial la lernanto unue lernas la plej ofte uzatajn kaj bezonatajn vortojn por povi paroli pri oftaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Ankaŭ la gramatikaj elementoj estis ordigitaj laŭ sia graveco kaj en la lernolibro ili aperas en tiu sinsekvo.

La komprenon de la vortoprovizo helpas ilustraĵoj kaj la bildvortaro, kiu aperas laŭ la rando de la paĝoj (la lernolibron ilustris mia filino Linda). Fine de ĉiu leciono, aperas vortolisto kun nacilingvaj tradukoj de la novaj vortoj. Fine de la lernolibro aperas dulingva vortaro. La lernolibro enhavas multajn tekstojn pri ĉiutagaj temoj kiel familio, aĉetumado, homa korpo, taga rutino, naturo, sezonoj, kalendaro ktp. Krome estas lingvo-ekzercoj, por ke lernantoj ne nur legu, sed ankaŭ skribu kaj respondu.

Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, eldonis androidan programon kun la teksto kaj ilustraĵoj de la lernolibro *Esperanto per rekta metodo.* Ĝi estas senpage elŝutebla ĉe www.iei.nl/apo/, aŭ ĉe https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperanto (nacilingve, unua parto) kaj https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperantoplus (dua parto).

Stano MARČEK

(*Fonto: https://uea.facila.org/artikoloj/libroservo/%E2%80%9Cesperanto-per-rekta-metodo%E2%80%9D/)*

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits (*la dua membro elektota*).
Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny, Mireille Grosjean.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*
ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*
IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*
TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**
UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**
LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. Nedeljka Ložajić, *nedeljkalozajic@gmail.com*.
kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*
UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**
Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.
kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **12,50 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 12,50 € por la A-landoj, 6,25 € por la B-landoj kaj 1 € por la C-landoj**. **Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €.** Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, <*ilei.kasisto@ gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, *www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-70) 931-0530.*
Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.

Ni fermis la nunan numeron la 31-an de oktobro 2022,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de januaro 2023.

„Esperanto per rekta metodo“ en 45 lingvoj

Riĉe ilustrita lernolibro de Esperanto de Stano Marček, taŭga por kursoj kaj memlernantoj.


La lernolibro jam aperis en 45 lingvoj: la angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hinda, hispana, hungara, indonezia, internacia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, portugala (brazila), rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama.





La lernolibron akompanas didaktika materialo:

Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (por instruistoj, 500 kartoj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – **ankaŭ sur KD** – por projekcii la bildojn); **KD Modela elparolo** en mp3 (voĉlegitaj Esperantaj tektoj + **la lernolibro** en diversaj lingvoj en pdf); **Pekseso Esperanto** (kartludo, 12 volumoj kun 288 bildoj el la lernolibro), **Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto,** Fabeloj de Andersen kaj Grimm; 107 **krucenigmoj en Esperanto; „Apo“ (aplikaĵo)** por telefonoj: *http://www.iei.nl/apo/* **Pli da informoj ĉe:** *http://katalogo.uea.org/* – aŭtora nomo „Stano Marček“ (137 titoloj).



Esperanto-aŭskultejo de Stano Marček – libere elŝuteblaj sonlibroj kaj kantoj en Germana Esperanto-Biblioteko Aalen: *t1p.de/auskultejo1*